


EL POPOLA ĈINIO

4

1973





Laminatado

La Ĉina Industrio Antaŭenmarŝas Firmpaŝe



La vastaj laboristaj amasoj de Kajluan-karbominejo serioze efektivas la ĝeneralan linion de socialisma konstruado kaj disvolvas laboran konkurson, kaj dank' al tio multe altiĝis la produktivo.




Serioze plenumante la ĝeneralan orientilon de disvolvo de la nacia ekonomio “kun la agrikulturo kiel bazo kaj kun la industrio kiel gvida faktoro”, la vastaj laboristaj amasoj de la industria fronto de nia lando klopodis produkti novajn specojn kaj bone plenumis aŭ superplenumis la ŝtatan produktan planon. Dank’ al tio aperis prospera situacio sur la industria fronto.

Kun profunda disvolviĝo de la amasa movado “lerni de Daking en industrio”, senĉese multiĝas avangardaj entreprenoj de Daking-a tipo en la diversaj industriaj branĉoj. Ili atingis elstarajn sukcesojn en ekspluato de latentaj produktaj fortoj kaj fortigo de administrado.

La laboristoj kaj oficistoj de la ŝanhaja ferŝtala industrio plenumis la ŝtatajn planojn por produkti ŝtalon kaj ŝtalajn materialojn respektive je 47 kaj 46 tagoj antaŭdate.






Laboristoj kaj oficistoj de la Ŝenjang-a Transformatora Fabriko plenumis la ŝtatan planon de 1972 antaŭdate je unu monato. Jen laboristoj muntas transformatoron.



Traktoroj produktitaj de la Tiangin-a Traktora Fabriko estas tuj liverotaj al uzantoj.


La Pekina Tinkurejo plenumis la produktan planon de 1972 antaŭdate je 108 tagoj.





Zon-fanda forno de singulara kristalo produktita de la Pekina Fabriko de Radiaj Instrumentoj

Kadroj kaj laboristoj de la Hetian-a Tapiŝa Fabriko de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono ekzamenas la kvaliton de siaj produktaĵoj.



La laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Kvara Fabriko de Telekomunikaj Ekipaĵoj sukcese provfabrikis 1000-linian elektronikan telefonan komutilon.

La Malpeza Industrio de Ĉinio

LA malpeza industrio de la nova Ĉinio estas disvolviĝinta surbaze de la postĝinta malpeza industrio antaŭ la Liberiĝo. Dum la pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko, nia lando konstruis nombron da modernaj grandaj entreprenoj kaj multajn mezgrandajn kaj malgrandajn entreprenojn de malpeza industrio. La produktokvantoj de diversaj malpezindustriaĵoj grandmezure pliiĝis, la kvalito senĉese altiĝis kaj la varioj kaj specoj pli abundiĝis. La postĝinta malpeza industrio en la malnova Ĉinio estas anstataŭigita paŝon post paŝo per la sendependa socialisma malpeza industrio.

RELATIVE RAPIDA DISVOLVIĜO

Post la Liberiĝo, la Partio kaj registaro de nia lando donas atenton al la disvolvo de agrikulturo kaj peza industrio, kaj samtempe ankaŭ al tiu de malpeza industrio. Kun la ĉiufanka ŝveliĝo de la nacia ekonomio ankaŭ la malpeza industrio relative rapide disvolviĝis.

Ni prenu la ŝpinteksan industrion kiel ekzemplon. Trapasinte duonan jarcenton ekde la fondiĝo de la unua koton-ŝpinteksejo de nia lando en la naŭdekaj jaroj de la 19-a jarcento, antaŭvespere

Tradiciaj vivbezonaĵoj fajencaĵoj produktitaj de la fajencejo en Dingŝuĝen, Ĝiangsu-provinco




de la Liberiĝo en 1949, nia lando starigis nur kvin milionojn da kotonŝpinaj spindeloj, el kiuj duono estis starigita de imperiistoj por rabi krudan materialon kaj malkarajn laborfortojn de nia lando. La nombro de la koton-ŝpinaj spindeloj nove starigitaj per niaj propraj fortoj nur en dek jaroj post la Liberiĝo jam ege superis la diritan nombron. Antaŭ miloj da jaroj nia lando jam komencis produkti silkajon. Sed dum la regado de la kuomintang-reakciularo, ĝia produktado dekadencis tagon post tago. Nun en multaj lokoj starigis novaj modernaj silkaj-fabrikejoj, kaj la produktokvanto de silko de la tuta lando pliiĝis je 9-oblo kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj tiu de silkaĵo je pli ol 7-oblo. Senĉese aperas novaj varioj kaj specoj de silkaĵoj.

Ankaŭ la porcelana industrio kaj metiartoj de nia lando kun longa historio havis grandan disvolviĝon. Pli kaj pli vigliĝas la produktado de diversspecaj porcelanaĵoj de Gingdeĝen en Gianghi-provinco, de delikata porcelanaĵo de Liling en Hunan-provinco kaj Tangŝan en Hebej-provinco, de blua porcelanaĵo de Longkjuan en Ĝegiang-provinco, de purpura fajenco de Jihing en Giangsu-provinco kaj aliaj. En Pekino, unu el la lokoj kun disvolviĝintaj metiartoj, la nombro de laboristoj kaj oficistoj okupiĝantaj pri metiartoj estas dekoble pli multa ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, la totala produktovaloru de metiartaĵoj

en 1971 kreskis je 50-oblo kompare kun tiu en la nomita periodo, kaj pli ol mil novaj varioj kaj specoj estis kreitaj. Ankoraŭ pli prosperas kaj vigliĝas la verkado, projektado kaj produktado de multaj metiartaĵoj kun longa historio kaj lokaj karakterizaĵoj, kiel klozoneo kaj gravuritaj lakobjektoj de Pekino, skulptaĵoj el eburo, jado, ŝtono kaj ligno de Ŝanhajo, Pekino, Kantono, Ĝegiang kaj Henan, tapiŝo de Tiangin kaj Hetian de Hingiang, punktoj de Guangdong, vitraĵoj de Ŝandong, lakvazoj de Fuĝoŭ, brodaĵoj de Suĝoŭ kaj Hunan, pajlaj plektaĵoj de Henan kaj Ŝandong kaj bambu-plektaĵoj de Siĉuan.

Ni starigis kun relative alta rapideco ankaŭ nombron da novaj branĉoj de malpeza industrio kiel tiujn de kemia fibro, plasto kaj plastaĵoj, sinteza purigilo, sinteza gras-acido, sinteza aromaĵo, brak-horloĝo, biciklo, stebmaŝino, fotografilo, optika vitro, impresiĝemaj materialoj kaj aliaj, kio kompletigis paŝon post paŝo la malpezan industrion de nia lando je branĉoj kaj produktaĵoj. Nun en multaj provincoj kaj municipoj de la tuta lando troviĝas kemifibraj fabrikejoj kaj en la lastaj jaroj ne nur la produktokvanto de kemiaj fibroj kreskis kun relative granda mezuro sed ankaŭ aperis multaj specoj de sinteza fibro kiaj poliestero, poliamido kaj orlono aldone al la antaŭaj produktaĵoj de viskozaj fibroj. Antaŭ la Liberiĝo nia lando povis nur munti biciklojn kaj stebmaŝinojn el iliaj partoj importitaj el



Utiligante sukerkanan rekrementon Giangmen-kemifabrikejo de Guangdong-provinco produktas paston por artefarita fibro kaj papero.

fremdaj landoj sed nun nemalmultaj provincoj kaj municipoj jam povas ilin produkti grandkvante. La produktokvanto de bicikloj en 1971 estas 5-oble pli multa ol tiu de 1957.

La nove fonditaj industrioj de plasto, sinteza fibro kaj aliaj kaj multigis la specojn de vivbezonaĵaj industriaĵoj kaj liveris bonkvalitajn novtipajn materialojn kaj akcesoraĵojn por la fakoj de konstruado, agrikulturo, fiŝado, maŝinfabrika, elektro-aparato, metalurgio, minekspluatado, kemiindustrio kaj aliaj, kio subtenis produktadon de agrikulturo kaj industrio.

Antaŭ la Liberiĝo la merkato de nia lando estis plenigita de fremdlandaj varoj. Nun tiu stato jam ĝisfunde ŝanĝiĝis. Niaj malpezindustriaĵoj kaj garantias plenumon de la bezono de la enlanda merkato kaj plivastigas la eksteran komercon de nia lando.

La disvolviĝinta malpeza industrio akumulis grandan sumon da kapitalo por la socialisma konstruado de nia lando. La kapitalo akumulita de nia malpeza industrio en 1970 por la ŝtato egalas al la totala sumo de la kapitalo investita de la ŝtato al la malpeza industrio dum 20 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

POR LA BEZONO DE LA POPOLO

En sia produktado, la malpeza industrio de nia lando persistas pri la direkto servi al la popolo. La projektado de produktaĵoj kaj la aranĝo de produktado de la malpeza industrio, koncerne al la kvalito, specoj, normoj, desegnoj, ornamado, enpakado kaj tiel plu, estas farataj ĉiam laŭ la bezono de la ŝtato kaj popolo. La laboristoj kaj oficistoj sur la malpezindustria fronto klopodas por kontentigi la pli kaj pli kreskantan bezonon en la vivo de la diversnaciecaj popolanoj en urboj kaj kamparo, per malpezindustriaĵoj kun bona aplikebleco, malalta prezo kaj bela aspekto.

En nia lando, ĉirakŭ 80% de la totala loĝantaro vivas en la kamparo. La malpezindustriaĵoj kaj entreprenoj donas specialan atenton al pliprodukto de malpezindustriaĵoj taŭgaj al uzo en la kamparo. Ili provizas senĉese la vastan kamparon per diverskoloraj ŝtofoj kun helaj desegnoj, diversspecaj iridiaj plumoj kun malalta prezo, solidaj ŝarĝ-bicikloj kaj diversaj vivbezonaĵoj kun malalta prezo kaj bona kvalito kiaj emajlaj lavpelvoj, vivbezonaĵaj porcelanaĵoj, termosoj kaj vekhorloĝoj, por kontentigi la bezonon de kamparanoj.



Sportludila Fabriko Liŝeng de Tiangin produktas piedpilkojn, korbopilkojn kaj volejbalojn kun marko "Hua Guang" kaj "Ginbej". Jen gelaboristoj ekzamenas ilian kvaliton.

Per enketo aŭ ekspozado pri kvalito de produktaĵoj en fabrikoj, minejoj, vilaĝoj, trupoj kaj naci-malplimultaj regionoj, la malpezindustriaĵoj kaj entreprenoj de multaj lokoj rekte aŭskultas opiniojn de konsumantoj kaj senĉese plibonigas la projektadon de produktaĵoj. La trikajaj produktaĵoj de la urbo Gilin de Gilin-provinco trovis per enketo, ke pulovero estas tre maloportuna al ministroj laborantaj en galerio, do ili produktis trikitan veston taŭgan al la laboristoj. Laŭ opinioj de la amasoj, fabrikoj de Tiangin fabrikis aluminian kaldronon kun maldikigita muro kaj dikigita fundo, tiel ke ĝi povas esti uzata duoble tiom longe ol antaŭe.

PLI KAJ PLI RACIIGATA DISPOZICIO

En disvolvo de malpeza industrio, nia lando persistas en la principo de samtempa disvolvo de centraj kaj lokaj industrioj, samtempa disvolvo de grandaj entreprenoj kaj mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kun mezgrandaj kaj malgrandaj kiel la ĉefaj, per tio plene mobilizis la aktivecon de lokaj aŭtoritatoj kaj la vastaj amasoj en disvolvo de mal-



Vang Juanĝi (meze), laboristino de la Spinteksejo de Vuhu, Anhuj-provinco kuraĝigas junajn laboristinojn lerni teknikon.

peza industrio, kaj starigis, en diversaj lokoj, grandan nombron da mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj laŭ tieaj kondiĉoj. Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, la malpezindustriaj bazoj faris novajn kontribuojn, tiuj regionoj kies malpeza industrio estis postiginta en la pasinteco ŝanĝas sian fizionomion, la memproviza nivelo de diversaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj per malpezindustriaj altigis paŝon post paŝo kaj la dispozicio de la produktoj pli kaj pli raciigas.

Ŝanhajo, Tiangin, Giansu, Guangdong, Ŝandong kaj aliaj malpezindustriaj bazoj ĉe marbordoj kontinue altigas sian produktadon, plene utiligante siajn antaŭajn ekipaĵojn kaj teknikajn fortojn. La nuna totala produktovalorado de malpeza industrio de Ŝanhajo altigis je pli ol 10-oblo kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. De post la fondiĝo de la popola respubliko nombro da nove aperintaj malpezindustriaj fakoj en Ŝanhajo fabrikis nemalmultajn novajn produktaĵojn kun avangarda nivelo. En 1971 sola, la ŝanhaja malpezindustria sistemo produktis jam dekmil novajn variojn kaj specojn. Tiuj ĉi malpezindustriaj bazoj ankaŭ helpas internajn lokojn en ilia fondo de malpezindustriaj entreprenoj per homforto, materio kaj tekniko.

Tiuj regionoj, kie peza industrio estas relative disvolviginta, aktive disvolvas ankaŭ malpezan industrion. En la urboj Ŝenjang, Anŝan kaj aliaj de

Liaŭning-provinco, kie koncentriĝas pezindustriaj entreprenoj, nombro da fabrikoj de malpeza industrio estas konstruita. Nun la provinco povas sufiĉe memprovizi kun superfluo per granda nombro da malpezindustriaj produktaĵoj.

En limregionoj kaj nacimalplimultaj regionoj de nia lando malpeza industrio starigis komence de nulo. En la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono oni konstruis pli ol mil novajn fabrikojn de malpeza industrio ekde la granda kultura revolucio. Nun ĝia produktokvanto de sukero pliiĝis je kvaroblo kompare kun tiu de 1957, kaj tiu de kotonŝtofo je pli ol unuoblo. Ĝi jam povas sufiĉe aŭ fundamente memprovizi per sukero, aluminiuj kaldronoj, emajlaj vazoj, ŝtrumpetoj el poliamido, silkaĵoj kaj aliaj.

La fabrikoj de malpeza industrio en la malnova Ĉinio koncentriĝis en malmultaj urboj marbordaj fore de produktoj de krudmaterialoj kaj konsumaj merkatoj. En tiu tempo en Ŝanhajo sola koncentriĝis 47% de la ekipaĵoj de kotonŝpinteksado kaj 75% de ekipaĵoj de lanŝpinteksado de la tuta lando. Nun preskaŭ ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando starigis siajn modernajn kotonŝpinteksejojn. La ekipaĵoj de kotonŝpinteksado en la internaj lokoj estis nur malpli ol 15% de tiuj de la tutlandaj en la komenca periodo post la Liberiĝo dum la nunaj estas 45%. En Interna Mongolio, Gansu, Hingiang, Kinghaj kaj Tibeto, kie abunde produktiĝas lano, konstruiĝis novaj modernaj lanŝpinteksejoj kaj la kapablo de lanŝpinteksaj ekipaĵoj en internaj lokoj kreskis preskaŭ 5-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Antaŭ la Liberiĝo, la salprodukto de nia lando koncentriĝis en kelkaj grandaj marbordaj salproduktejoj. Nun nemalmultaj internaj lokoj disvolvis produktadon de lagsalo, minsalo kaj putosalo kaj la provincoj Hunan, Gianghi kaj Gujĝoŭ jam finis la historion de manko de salprodukto.

PERSISTI EN SINAPOGO SUR PROPRAJ FORTOJ

Nia lando estas abunda je riĉfontoj, kio metis solidan materian bazon por disvolvi malpezan industrion. Sed en la malnova Ĉinio, la abundaj riĉfontoj ne povis esti plene utiligataj kaj plejparto de krudmaterialoj bezonataj de la tiama malpeza industrio devis esti importataj. Ekzemple, de la jaro 1946 ĝis la jaro 1949, duono de la kotono uzata de la ŝpinejoj en la tuta lando estis impor-

tita el kapitalismaj landoj. Post la Liberigo, ni aktive disvolvas la produktadon de krudaj materialoj, senĉese plivastigas iliajn fontojn kaj tiel metis la disvolvon de malpeza industrio sur pli solidan bazon.

Plejparto de la krudmaterialoj de malpeza industrio devenas de agrikulturo. Nia agrikulturo akiris riĉrikoltojn dum sinsekvaj dek jaroj, kio ebligis al ĝi liveri pli kaj pli multajn krudmaterialojn al malpeza industrio. De post la fondiĝo de la popola respubliko la kvanto de koton sola liverita al ŝpinteksa industrio kreskis jam pli ol 4-oble.

Samtempe kun tio, ankaŭ malpezindustriaj fakoj kaj entreprenoj plifortigas la subtenon al agrikulturo kaj starigis relative stabilajn provizkanalojn de krudmaterialoj. Ekzemple, la Nanning-a Ladmanĝaĵa Fabriko de Guanghi starigis bazlokojn de krudmaterialoj verda glavfazeolo kaj ananaso en proksimaj komunumoj kaj produktaj brigadoj, tiel ke ne nur la kvanto de krudmaterialoj estas garantiata sed ankaŭ la kvalito des pli konvenas al la bezono de prilaboro, kaj la aplikebleco de la

tieaj verdaj glavfazeoloj jam altiĝis ĝis 95 %.

Kun la disvolviĝo de modernaj sciencoj kaj teknikoj de nia lando, precipe de industrioj metalurgia, karba kaj petrol-kemia, nia lando energie disvolvas industriajn krudmaterialojn por malpeza industrio en samtempa disvolvo de agrikulturaj kaj industriaj krudmaterialoj, kaj pli kaj pli multe anstataŭigis la agrikulturajn per la industriaj. La vasta apliko de industriaj krudmaterialoj malfermis larĝan vojon por sendepende kaj memdecide disvolvi malpezan industrion de nia lando.

Antaŭ la Liberigo nia lando eĉ devis importi ŝtalodratajn ringojn uzatajn en ŝpinteksado. Nun relative kompleta sistemo de mekanika industrio de malpeza industrio de nia lando jam unuapaŝe formiĝis progresante de riparado al fabrikado, de imitado al sendependa projektado, de farado de unuopa maŝino al tiu de kompleto da ekipaĵoj kaj de malgrandkvanta produktado al pogranda produktado kaj ni jam povas mem produkti en kompleto plejparton de specialaj ekipaĵoj bezonataj en la disvolvo de malpezaj industrioj de ŝpintekso, sukerfaro, paperfaro, plasto kaj aliaj.



*Kampara foiro de
Dafeng-gubernio de
Giangsu-provinco*

Rejuniĝas Malnova Fabriko

LA Nantong-a Dua Kotona Ŝpinteksejo de Giangsu-provinco jam havas historion de 53 jaroj. Antaŭ la Liberigo, sub la kruela premado kaj prirabado de la kuomintangaj reakciuloj kaj imperiistoj, tiu fabriko trapasis diversajn ŝanĝojn en administrado: jen ĝi hipotekis siajn domojn kaj ekipaĵojn por ricevi pruntojn; jen ĝi luigis ilin al aliaj entreprenistoj; jen ĝi funkciis sub la kontrolo kaj direktado de pruntodonantoj. Je la Liberigo en 1949, la fabriko havis nur 1,200 laboristojn kaj oficistojn, 16,000 spindelojn kaj 300 teksilojn, ĉiujare ĝi povis produkti maksimume pli ol 6,000 pakojn da koton-fadeno kaj pli ol 3,100,000 metrojn da ŝtofo. Post la Liberigo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, tiu fabriko estis paŝon post paŝo transformita en novan socialisman entreprenon plenan de vicleco. Ĝi nun havas pli ol 2,850 laboristojn

kaj oficistojn, pli ol 48,900 spindelojn kaj 760 teksilojn, kaj cetere, ĝi konstruis kemifibran laborejon. Ĉiujare ĝi povas produkti pli ol 29,000 pakojn da koton-fadeno kaj pli ol 13,160,000 metrojn da ŝtofo. Ankaŭ la specoj de ĝiaj produktaĵoj multigis senĉese kaj la kvalito stabile pliboniĝas.

Kiel ĉio ĉi tio fariĝis?

RENOVIGO DE LA MALNOVAJ EKIPAĴOJ

La maŝinoj kaj ekipaĵoj de la nomita fabriko plejparte estis importitaj dum la dudekaj kaj tri-dekaj jaroj. Post la Liberigo, precipe de la granda antaŭensalto en la jaro 1958, parto de la malnovaj maŝinoj estis unuapaŝe reformita dank' al serio da teknikaj renovigoj. Sed kun la disvolviĝo de nia socialisma konstruado, ĝi devis pliprodukti teksaĵojn de pli alta kvalito kaj tiuj malnovaj

Laboristinoj interŝanĝas produktajn spertojn.





maŝinoj ne povis adaptiĝi al la novaj bezonoj. La vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj decidis ĝisfunde reformi tiujn maŝinojn.

Unu grupo el laboristoj, kadroj kaj teknikistoj por reformi malnovajn ekipaĵojn stariĝis sub la gvido de la partia komitato de la fabriko. Post analizo ili trovis ke unu el la ŝlosilaj problemoj por ŝanĝi la fizionomion de produktado estas altigi la rapidecon de la spindeloj, kaj por tio ili devas reformi la malnovajn spindelojn en tiujn kun altrapida lagro. Post ripetada studado kaj desegnado de centoj da planoj kaj farinte pli ol 50 eksperimentojn ili fine kreis novan specon de spindelo. Sed, kiam oni prove uzis tiujn novajn spindelojn sur la maŝino, aperis fenomenoj de elgutado de oleo kaj skuiĝo. Tamen la veterana laboristo Ŝen Ginŝeng kaj teknikisto Ĝoŭ Kiven k. a. ne deprimiĝis pro tio. Ili serioze esploris la kaŭzon kune kun aliaj laboristoj, reviziis la projekton kaj fine forigis la mankojn.

Sin apogante sur la propraj fortoj kaj kun parta subteno de la ŝtato, tiu fabriko plenumplekse reformis la tutan ekipaĵon ekde prilaboro de kotono ĝis pretigo de fajnaj fadenoj. En la pasinteco la maksimuma rapideco de la spindeloj ne superis 12,000 revoluojn. Sed nun post reformo ĝi atingis 18,000 revoluojn ĉiuminute, kaj la hora produkto-kvanto de kotona fadeno po mil spindeloj pliiĝis de 17 kg. al pli ol 43.

PRODUKTI BONKVALITAJN VAROJN POR LA POPOLO

Dum efektivigo de alta produktado oni ankoraŭ klopodis garantii kaj altigi la kvaliton. La partia komitato de la fabriko organizis la laboristojn por diskuti tiun problemon. Multaj veteranaj laboristoj diris, ke antaŭ la Liberiĝo la kapitalistoj de ĉi tiu fabriko ne atentis pri la kvalito kaj eĉ vendis malbonajn produktaĵojn kiel bonajn por akiri ekstran profiton, kaj ke la fabriko nun estas socialisma entrepreno, kaj Prezidanto Maŭ instrukiis, ke **“Por ĉiu produktaĵo estas postulata ne nur granda kvanto sed ankaŭ bona kvalito; ĝi estu eltenema por daŭra portado kaj longa uzado”**. Do la kvalito de la produktaĵoj nepre devas esti garantiata.

Sub la slogano “ŝpini kaj teksti bonkvalite por tutanime servi al la popolo”, tiu ĉi fabriko plibonigis la administradon sin apogante sur la laboristaj amasoj. Ĝoŭ Hiaŭfeng, kiu laboris jam 25 jarojn en la fabriko, estas ŝpinistino kaj ankaŭ kontrolistino de sia laborgrupo. Iun nokton dum deĵoro ŝi trovis ke la dikeco de kotonaj tiriĝaĵoj sur la maŝinoj por primara tordado estas iom ne unueca; ŝi tuj raportis tion al la teknika fako. Post reguligo eliminiĝis tiu fenomeno, sed poste ripetigis la samo je la dua horo matene. Ŝi pensis en si, ke oni devas

solvi tiun problemon se oni volas garantii bonan kvaliton. Post kuna analizo kaj esplorado, kune kun maŝinprotektistoj kaj teknikistoj, ŝi fine trovis la kaŭzon kaj tuj alprenis efikan paŝon kontraŭ la fenomeno. Dank' al la serioza devkonscia sinteno de laboristoj, multaj demandoj pri kvalito en la produktado estis ĝustatempe solvitaj.


Por altigi kvaliton de la produktaĵoj, la nomita fabriko okazigas periode demonstradon de modela laborprocedo kaj interŝanĝon de tekniko. Krome, la laboristoj klopodas lertigi sian bazan teknikon en postlabora tempo, tiel ke ilia teknika nivelo rapide progresas. Ankaŭ la aktiva kunordigo de ĉiuj sinsekvaj procedoj kreas favoran kondiĉon por bonkvalita produktado. Dank' al ĉio ĉi tio, 99% de la kotona fadeno kaj 97% de la kotona teksaĵo produktitaj de tiu ĉi fabriko atingis la unuaklasan normon. En la lastaj jaroj la kvalito de la fabriko ĉiam rangas en avangarda nivelo de la tuta lando.

KLOPODO POR PLIMULTIGI VARSPECOJN

En la montrejo de produktaĵoj de la fabriko oni povas vidi, ke la specoj de la produktaĵoj ĉiam laŭgrade kreskis. En la komenca periodo post la Liberiĝo, ĝi ne povis ŝpini fajnajn fadenojn kaj teksi nur krudan ŝtofon; sed nun ĝi produktas pli ol dek specojn de fajnaj fadenoj kaj teksas 6 specojn de bonkvalitaj ŝtofoj kotonaj kaj tiuj miksitaj kun kemiaj fibroj.

Por tiu ĉi malnova fabriko la ŝpinado kaj teksado de kemifibroj estas nova tasko, tiel en la tekniko kiel en la ekipaĵoj. Persistante en sinapogo sur la propraj fortoj, ili konstruis kemifibran laborejon. Laŭ karakterizaĵoj de poliesteraĵoj ili modifis aŭ reformis la antaŭajn procedojn uzatajn por kotonaj fibroj kaj rapide sukcesis produkti ŝtofon el miksitaj fibroj kotonaj kaj poliesteraĵoj. Nun ili klopodas senĉese plialtigi la procentojn de unuaklasaj produktaĵoj de tiu ŝtofo kaj la malnova fabriko rejuniĝas kaj elsendas novan brilon!

Laboristoj kaj teknikistoj kune reformas kardmaŝinon.





Laboristoj ekzamenas la kvaliton de brakhorloĝoj per aparatoj produktitaj de nia lando.

Brakhorloĝo “Dongfeng”

de HIAŬ HJUEŜENG

TIANGIN-A Brakhorloĝa Fabriko estas unu el tiuj fabrikoj, kiuj plej frue produktis brakhorloĝojn en Ĉinio. Komencante de la fondiĝo de prov-fabriko grupo ĝi jam havas historion de 18 jaroj.

La brakhorloĝoj produktataj de la fabriko, kiuj portas la markon “Dongfeng” estas vaste akceptataj kaj ŝatataj de la aĉetantoj en nia lando.

LA UNUA BRAKHORLOĜO

En la posta duonjaro de 1954, gvidantoj de la Unua Buroo de Malpeza Industrio de Tiangin invitis kelkajn horloĝistojn al kunsido kaj faris al ili demandon: “Ĉu vi, horloĝistoj de nova Ĉinio, povas produkti brakhorloĝojn por plenigi la mankon de brakhorloĝa industrio en nia lando?” La demando estis ne atendita, sed tre entuziasmiga.

De tio veterana horloĝisto Ĝang Ŝuven, kiu ĉeestis la kunsidon, estis multe agitata. Li eklaboris kiel metilernanto en la aĝo de dekkvin jaroj en iu horloĝriparejo kaj dum 24 jaroj riparis sennom-

brajn brakhorloĝojn, sed neniu el ili estis produktita en Ĉinio. Kiel horloĝistoj esperis, ke nia lando mem produktu brakhorloĝojn. Tamen, en la malnova Ĉinio duonfeŭda kaj duonkolonia la espero restis nur neatingebla revo. Kiel ĝojinde ke en la kvina jaro post la Liberiĝo la Partio kaj ŝtato jam elmetis la taskon provfabriki brakhorloĝon.

Nelonge poste, la gvidantoj elektis Ĝang Ŝuven, Vang Ĉimin kaj du aliajn kvalifikitajn horloĝistojn el horloĝaj riparejoj kaj fabrikoj por provfabriki brakhorloĝon. Kaj en januaro de la posta jaro la grupo komencis sian laboron.

Informiĝinte pri tio iu kapitalisto, kiu antaŭe sin okupis pri maŝinkonstruado venis por rigardi ilin. Vidinte ke en malgranda ĉambro de iu horloĝfabriko kvar laboristoj provas fari brakhorloĝon, kun unu 15-juvela brakhorloĝo kiel modelo, uzante kvar malnovajn ordinarajn ilmaŝinojn kaj kelkajn simplajn instrumentojn, li mokis: “Hm, simpla infanaĵo, ke vi volas tiel provfabriki brakhorloĝon!” Sed la laboristoj respondis: “Ni do vidu!”

Multajn malfacilojn la horloĝistoj alfrontis en la komenco. Antaŭ la modelo kun pli ol 120 delikataj elementoj oni ne sciis kiel komenci. Sed ili pensis ke la unua brakhorloĝo en la mondo certe estis farita ankaŭ post provado. Ni havas la gvidon de la Partio kaj sperton en praktika laboro, ni certe sukcesos, nur se ni koncentru nian saĝon kaj ripe-tade provu. Ili prilaboris prove la unuan pecon de maŝinelemento laŭ la mezuro de tiu de la modelo jen uzante la ilmaŝinon jen per la mano. Kiam la provfarita elemento estis muntita en la modelo, ĝi bone funkciis. Tio multe ilin kuraĝigis.

Sed ili ankoraŭ devis sperti multajn malhelpaĵojn. Iuj maŝinelementoj ne estis laŭnorme faritaj eĉ post kelktaga provado. La gvidantoj ĉiam kuraĝigis ilin: Ne timu malsukcesojn, sed bone resumu sperton el ili por fine atingi sukceson. Kaj la ŝtata delegito de la horloĝa fabriko preskaŭ ĉiutage iris al ili. Iafoje, kiam ili plu laboris nokte, la delegito devis admoni ilin al ripozo. La kuraĝigo kaj prizorgemo de la gvidantoj varmigis ilian koron kaj multe fortigis ilian memfidon.

Pasis du monatoj kaj duono. La unua brakhorloĝo kunmetita el elementoj de ili mem faritaj naskiĝis finfine. Kiam ili aŭdis la klaran tiktakadon kaj vidis la ĉirkaŭiradon de la sekunda montri-lo sur la ciferplato, ili tre ekscitiĝis pro ĝojo.


Por celebri la Unuan de Majo ili fabrikis areton da brakhorloĝoj. Kvankam tiuj estis ankoraŭ ne precize faritaj kaj iris ne sufiĉe ĝuste, tamen ili formis la unuan paŝon por disvolvi brakhorloĝan industrion en nia lando.

Tiutempe la gvidantoj plifortigis la teknikajn fortojn de la prov-fabrika grupo, provizis ĝin per novaj ekipaĵoj kaj plivastigis la laborejon. Post preparado la Tiangin-a Brakhorloĝa Fabriko oficiale fondiĝis en la Nacia Festo de 1958. Ĝi fabrikis 17-juvelajn brakhorloĝojn kun la marko "5.1" (1-a de Majo), por kontentigi la bezonojn de enlanda merkato.

MEMPROJEKTADO

Kun la disvolviĝo de socialisma konstruado kaj senĉesa leviĝo de la popola vivnivelo, la precizeco de la irado kaj la aspekta eleganteco de la brakhorloĝo "5.1" iom post iom ne povis kontentigi la aĉetantojn.

La gvidantoj de la fabriko elmetis tiun problemon antaŭ la laboristoj por solvado. Estis du opinioj. Iuj kamaradoj diris, ke post kelkjara penado jam



Jen la kvar laboristoj kiuj provfabrikis la unuan brakhorloĝon.

formiĝis propra procedaro kaj normala ordo en la produktado kaj ke laŭ ili oblige kreskas la produktokvanto. Tial estas preferinde daŭrigi la ĝisnunan produktadon kun kelkaj partaj plibonigoj anstataŭ urĝeme projekti tute novan produktaĵon. La plimultaj kamaradoj opiniis, ke la modelo "5.1" naskiĝis en la komenca periodo de nia brakhorloĝa industrio kaj estas imitaĵo de arkaika tridekjara produktaĵo el eksterlando. Jam ne sufiĉas partaj plibonigoj. Oni devas projekti novan brakhorloĝon kaj iri propran vojon en disvolvado de industrio.

En tiu tempo ĝuste disvolviĝas en la fabriko socialisma eduka movado. Pere de amasa mem-eduko pli alte leviĝis la socialisma aktiveco de la tuta personaro de la fabriko. Pliapase disvolvi la brakhorloĝan industrion en nia lando fariĝis ilia komuna strebado. Prikonsiderinte la opiniojn de la laboristoj kaj analizinte la bazajn faktorojn kaj teknikan forton de la fabriko la partia komitato de la fabriko opiniis, ke la kondiĉoj por prove produkti novan brakhorloĝon estis fundamente pretaj. En la komenco de 1966, la partia komitato organizis grupon por nova brakhorloĝo konsistantan el tri veteranaj laboristoj kaj kvar junaj teknikistoj por plenumi la taskon kun la postulo projekti memstare sen blinda imitado.

Memprojekto de brakhorloĝo estis nova problemo en nia brakhorloĝa industrio. Kamaradoj de la nomita grupo humile lernis la sperton de projektaj laboroj de aliaj industribranĉoj, ke projektaj laboroj ne devas apartiĝi de la praktiko kaj oni devas iri el projektaj ĉambroj al la amasoj.

Sub la apogo de la partia komitato ili iris rekte en ĉiujn laborejojn kaj tie kunvokis dekojn da kunsidoj por serioze enketi opiniojn de laboristoj kaj teknikistoj pri la brakhorloĝo "5.1" kaj peti de ili proponojn pri projektado de nova brakhorloĝo; ili krome faris vastan enketon ankaŭ ĉe alilokaj brakhorloĝaj fabrikoj kaj riparejoj. La kolektitaj analizoj kaj proponoj multe riĉigis ilian projektan ideon kaj havigis al ili fidindan materialon. Krome ili lernis ankaŭ en- kaj ekster-landajn avangardajn spertojn. Tiel iris glate la projektado de la 19-juvela brakhorloĝo sub la marko "Dongfeng", kun relative avangarda strukturo.

Antaŭ ol la komenco de normala produktado de "Dongfeng"-brakhorloĝoj, la fabriko speciale fabrikis 2,000 specimenajn pecojn por distribui ilin inter mararmeanoj, aviadistoj, kamparanoj, ŝtalaj laboristoj, ŝoforoj, kuiristoj... por provi ilin en diversaj medioj kaj peti kritikojn. Post unu jaro la uzintoj ĝenerale raportis, ke "Dongfeng" iris precize kaj havas belan aspekton, kaj esperis, ke oni ĝin rapide produkti.

POR PLI BONA KVALITO

Ĝuste kiam "Dongfeng"-brakhorloĝoj estis vaste vendataj en merkato, juna laboristino de iu kemifabriko venis al la fabriko por prezenti sian plendon. Ŝin akceptis Kiaŭ Guokjuan, la sekretario de la partia komitato de la fabriko, kiu estis informita ke ŝia nove aĉetita "Dongfeng"-brakhorloĝo enlasas humidecon laŭ la rando de la vitro. Ŝi diris sincere: "Unuopaj ne tute laŭnor-

maj pecoj inter brakhorloĝoj pogrande produktataj ŝajne ne estas grava demando por via fabriko, sed por la aĉetantoj, kiujn trafas tiuj pecoj, la afero estas tre malagraba."

La partia komitato de la fabriko serioze priatentis la kritikon de tiu laboristino. "Dongfeng" kun pli ol 150 elementoj devas trapasi sume pli ol mil laborprocedojn, de kruda materialo ĝis finpretigo. Se oni iom malatentas en iu el la procedoj, la sekvo estas malbonigo de la kvalito, kiu portos malagrablaĵon al la uzanto. Por ĉiam plibonigi la kvaliton necesas ke ĉiuj laborantoj de la fabriko rigore eliminu ĉian fuŝeton. La komitato invitis la laboristinon eldiri sian opinion pri "Dongfeng"-brakhorloĝo rekte al la tuta personaro de la fabriko, kio donis tre vivan edukon al la anaro. Post tio la laboristoj strebadas al pli alta nivelo en ĉiuj flankoj de la brakhorloĝo, ne kontentiĝante sole pri pasintaj normoj kaj precizeco de la irado de la brakhorloĝo.

Kaj ekzamenado estas rigore plenumata ne nur de specialaj kontrolistoj, sed ankaŭ de laboristoj ĉe akcepto de prilaboraĵoj liverataj de la antaŭiranta laborprocedo, por ke neniu nelaŭnorma elemento povas trapasi. La kunmunta laborejo publikigas la rezulton de ekzamenado laŭdante la bonajn kaj stimulante la malpli bonajn. Tiama-niere ili plibonigis la kvaliton de la brakhorloĝo.

En la jaro 1972, la fabriko ricevis honorflagon de la ŝtato pro sia elstara atingo en plenumado de la ŝtata plano, kaj nun ĝi klopodas provfabriki novajn specojn por kontentigi la bezonojn de nia popolo.

Kadro, teknikistoj kaj laboristoj kune klopodas por precizigi "Dongfeng"-brakhorloĝon.



Maŭtaj- brando



LA monde fama alkoholaĵo produktata en la urbeto Maŭtaj de Ĵenhuaj-gubernio, Gujĝou-provinco, jam havas historion de pli ol 270 jaroj. Ĝi estas kristale klara kun aparte agrabla aromo; ĝia forteco longe restas sentebla sed gustas milde kaj eĉ dolĉe post trinko. En la jaro 1915, ĝi gajnis la duan lokon inter la monde famaj alkoholaĵoj en la Panama Foiro. Kaj nun ĝi havas ankoraŭ pli grandan renomon tra la mondo.

En la malnova Ĉinio, la produkto de Maŭtaj-brando estis monopolita de malmultaj bienuloj kaj kapitalistoj. Ĝiaj farejoj konsistis nur el kadukaj domoj kun simplaj ekipaĵoj kaj la produktokvanto estis malalta. La kuomintangaj reakciuloj preskaŭ ruinigis la produktadon de Maŭtaj-brando per peza impostado kaj arbitraj pagigoj.

En la jaro 1949, Gujĝou-provinco estis liberigita, kaj brandlaboristoj emancipiĝis kiel mastroj. Sub la gvido kaj subteno de la Partio kaj popola registaro, la farejoj de Maŭtaj rapide disvolviĝis. De pli ol 20 jaroj, kun la disvolviĝo de nia nacia ekonomio kaj kreskantaj bezonoj de la en- kaj eksterlandaj merkatoj, la ŝtato senĉese pliiĝas al ĝi investojn por pligrandigi la produkton. Ĝis 1965, la produktokvanto de Maŭtaj jam pliiĝis pli ol dekoble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La produktokvanto de 1972 duobliĝis kompare kun tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Al la kvalito de Maŭtaj-brando kontribuas la apartaj lokaj kondiĉoj. La urbeto Maŭtaj situas en valetoj inter montoj de Junnan-Gujĝou-altebenejoj kaj tie vintre maloftas prujno kaj neĝo. La klimato estas tre milda. La tiea tero estas nomata "cinabra tero" pro sia ruĝa koloro. Fontoakvo de

la urbeto estas uzata por fari la brandon, kaj keloj estas konstruitaj el la "cinabra tero" por konservi la brandon kaj la milda klimato liveras favorajn naturajn kondiĉojn por produktado.

Tamen, krom tio al la bonaj kvalitoj de Maŭtaj kontribuas ankaŭ la aparta fermenta kaj produkta teknologio formita kaj evoluinta dum longa periodo dank' al kreado de la laboranta popolo. La fermenta periodo de Maŭtaj estas tre longa, kaj plurfoje estas ripetitaj la vaporumado de la materialo kaj ĝia fermentado en la keloj kaj distilado. Post longa konservado ĝi estas preta por envazigi kaj liveri al merkato. Maŭtaj-brando estas konservata en grandaj specialaj porcelanaj vazoj, kiuj povas helpi ĝian pliboniĝon en gusto kaj aromo dum konservado.

Post la Liberiĝo la brandfarantaj laboristoj kaj kadroj resumis kaj disvolvis tradician teknologion kaj rigorigis la produktajn procedojn, de elektado de materialoj kaj prilaborado ĝis kunmeto de ingrediencoj, fermentado, konservado kaj envazigo, ĉiu paŝo estas rigore kontrolata, por garantii la kvaliton. Por fortigi la karakterizan aromon de Maŭtaj, la brandfarejaj gvidantoj ofte organizis interŝanĝadon kaj resumadon de tekniko kaj sperto inter veteranaj laboristoj. Tiuj kun sia kelkdekjara sperto strebadas ĉiam al pli alta kvalito en la laboro. Ili alte atentis pri heredo de bona tradicia teknologio kaj samtempe faras kuraĝan provadon por trovi novan recepton ebligantan elstarigi la karakterizajn kvalitojn de la brando. Krome, la veteranaj laboristoj fervore instruas al la junaj laboristoj teknikon de brando-farado, por ke la lastaj rapide posedu ĝin kaj produktu la brandon pli multe kaj pli bone.

Daĝaj Marŝas Antaŭen

“KION faru Daĝaj, kiam la tuta lando lernas de ĝi?” demandis al la komunumanoj kamarado Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado. Kontinue disvolvante la gloran tradicion de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, en la lastaj jaroj, la Daĝaj-anoj donis sonoratan respondon al li per novaj venkoj en la batalo kontraŭ la naturo.

KONTINUA EDUKADO PRI LA LINIOJ

Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, la partia filio de Daĝaj-brigado ankoraŭ pli profunde komprenis: Oni povas senĉese progresi nur

se ili firme plenumas la revolucionan linion de Prezidanto Maŭ kaj persiste iras la socialisman vojon. Tial ili konstante faras edukon pri la linioj al kadroj kaj komunumanoj kaj tiel antaŭen puŝis ĉiujn laborojn.

Kiam la pomua (1 muo = 1/15 hektaro) produkto-kvanto de greno de Daĝaj atingis pli ol kvarcent kilogramojn, iuj kadroj kaj komunumanoj, pro manko de ĝusta kompreno pri la orientilo difinita de Prezidanto Maŭ “**ĉiufanka disvolviĝo kun greno kiel la ĉefĉenero**”, timis, ke entreprenado de forstokulturo, brutobredado kaj flankokupoj eble malbone influos altprodukton de greno. La partia filio rimarkis tion kaj opiniis necese serioze helpi

Konstruado de nova kampo per buldozo





Ĉen Jongguj, la sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado kune kun kadroj kaj komunumanoj projektas akvoutiligan konstruadon.

kadrojn kaj komunumanojn koni tiun problemon el la vidpunkto de batalo inter la du linioj. Sub ĝia gvido ili retrorigardis la iritan vojon de la interhelpa kooperativigo kaj pli klare komprenis la rilatojn de reciproka dependeco kaj reciproka akcelo inter la grena produkto kaj forstokulturo, brutobredado kaj flankokupoj kaj tiel altigis sian konon pri la graveco de ĉiuflanka disvolvo de tiuj entreprenoj. Sekve de tio ili akiris, plene utiligante la karakterizaĵojn de montregiono, ĉiuflankajn riĉajn rikoltojn kaj de greno kaj de diversaj aliaj entreprenoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, iuj komunumanoj de Daĝaj pensis ke "Daĝaj estas granda kaj riĉa kaj ne gravas malŝparo de kelkaj juanoj". La partia filio opinias, ke tio spegulas la pensfluon, ke iuj komunumanoj, precipe junaj, ne volas plu vivi simplan vivon kun la kresko de kolektiva ekonomio sub la nova situacio. Konsiderante pri tio, la partia filio prenis edukadon al junuloj kaj ĉiuj aliaj komunumanoj pri penema lukto en malfaciloj kaj diligentece kaj ŝparemo kiel gravan enhavon de la eduko pri la linioj, kaj tio pli kaj pli altigis ilian socialisman konscion. La komunumanoj diris, ke ŝanĝiĝis la produktaj kondiĉoj, tamen ne devas ŝanĝiĝi la laborstilo de penema lukto en malfaciloj; riĉiĝis nia

vivo, tamen ne devas perdiĝi la komunisma spirito ami la ŝtaton kaj la kolektivon; multiĝis la komuna akumulo, tamen ne devas esti forlasita la principo de ŝparema administrado de komunumo. Nun la kabineto de Daĝaj-brigado restas ankoraŭ en la malgranda domo kiel en la komenca periodo de la komunumo. En ĝi troviĝas kvar malnovaj tabloj kaj seĝoj uzitaj pli ol dek jarojn kaj kelkaj malgrandaj kestoj por teni kontlibrojn. Kaj plej kortuŝa estas la plurfoje riparita malnova abako, kiun oni uzis jam preskaŭ 20 jarojn. Ĝuste tiel diligente kaj ŝpareme la Daĝaj-anoj faras ĉiujn aferojn.

Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ, la kadroj de Daĝaj-brigado rigardas partoprenon en kolektiva fiziklaboro kiel gravan aferon por elimini burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismen. De multaj jaroj ili disvolvis jenan tradicion: la kadroj devas pli multe ŝviti ol la amasoj anstataŭ akcepti pli multan rekompencan, devas preni pli pezajn taskojn ol la amasoj anstataŭ ricevi pli multan avantaĝon, devas pli multe peni anstataŭ pli multe ĝui. Tutajn jarojn la kadroj tiel modele agas spite venton kaj pluvon. Ni prenu la jaron 1971 kiel ekzemplon, meznombro, ĉiu el la naŭ kadroj de la brigado laboris pli ol 290 tagojn. Per sia modela ago ili gvidas la komunumanojn brave marŝi antaŭen sur la vojo de daŭrigo de la revolucio.

REFORMO DE GRUNDO

Daĝaj antaŭe estis montvilaĝo kun malfekunda tero. Ĝiaj okcent muoj da kampoj dislokiĝis sur deklivoj kaj en valoj, kiuj estis facile damaĝeblaj kaj de sekegeco kaj de superakvo, kaj tie la plantidoj flaviĝis pro senpluveco en duona monato, dum pluvego detruis ĉiujn kampojn. La tieaj grundoj estis diversspecaj: ruĝa, blanka, sableca kaj glueca. Ili estis netaŭgaj por kultivado pro malfacila aerumo aŭ facila ellaso de akvo kaj sterko. La ekstreme granda inund-katastrofo en 1963 vidigis al la Daĝaj-anoj, ke nur reformo de grundo povas pligrandigi ilian rezistan kapablon kontraŭ naturaj katastrofoj. Sekve komenciĝis grandskala grundreformo samtempe kun riparado de la difektoj kaŭzita de la inundo.

En ruĝan kaj gluecan grundon kun kompakta strukturo ili enmiksas sablon por plifaciligi ĝian aerumon kaj en sablecan grundon enmiksas ruĝan kaj gluecan grundon por altigi ĝian kapablon teni sterkon kaj akvon. Post penlaboro de kvin jaroj, ili finfine reformis la du futojn dikan grundtavolon de ĉiuj kampoj en grundon kapablan teni sterkon,

akvon kaj aeron. Sur tiu bazo, ili pligrandigis la grund-fekundecon per aldono de organika sterko. La kvanto de organika sterko por ĉiu muo da tero estis pliigita pluroble, kaj tiel la grundo estas reformita jaron post jaro. Samtempe kun tio ili plidikigis la aktivan tertavolon, aplikante metodojn de aŭtuna profunda plugado, printempa profunda semado kaj somera profunda sarkado kaj krome pligrandigis grundfekundecon per stoploj kaj kulturo de legumenacaj plantaĵoj. Post pluraj jaroj, ili fine fekundigis ĉiujn kampojn per centkelk mil labortagoj.

ĈIUFLANKA DISVOLVIĜO

En la lastaj jaroj, la partia filio de Daĝaj-brigado donis apartan atenton al ĉiuflanka disvolvo de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado kaj flankokupoj. Nun ili klopodas por ŝanĝi la kultiv-sistemon unu-rikoltan en du-rikoltan, kaj la kultivadon de malaltproduktaj kaj krudaj grenplantaĵoj en tiun de altproduktaj kaj delikataj. Tie oni neniam kulturis rizon kaj kotonon en la pasinteco, sed en la lastaj du jaroj ili komencis provkulturi tion kaj akiris la sukceson de la pomua produktokvanto de pli ol 600 kilogramoj da rizo kaj 40 kilogramoj da sensemigita koton. Krome ili pligrandigis la kulturareon de tritiko kaj paŝo-post-

paŝe grandigis la procenton de delikata greno. Kaj la pomua produktokvanto de greno de la brigado altiĝis de pli ol 350 kilogramoj en 1964 ĝis 548 en 1971.


Hutoŭ-monto de Daĝaj, kalva antaŭ dek jaroj, nun estas kovrita de verdaĵo, multaj arboj kaj fruktaroj kreskas sur ĝi. En la lastaj kelkaj jaroj, la Daĝaj-anoj plantis pli ol sepdek mil arbidojn, meznombre pli ol cent-sesdek pokape. Pasintjare, ilia enspezo sole per vendo de pomoj, nuksoj, vinberoj, piroj, jujuboj kaj aliaj fruktoj jam atingis pli ol dekmil juanojn.

Antaŭ dek jaroj, la brutoj breditaj de Daĝaj povis nur kontentigi la bezonon de plugado, sed nun en ĝia bredejo ekster la vilaĝo estas gregoj de muloj, ĉevaloj kaj porkoj kaj la nombro de diversaj grandaj brutoj kaj tiu de porkoj kreskis oble.

Pli multiĝis la objektoj de flankokupoj de Daĝaj-brigado. Establiĝis brikfarejo kaj kalkpreparejo, precipe nove establiĝis feraĵ- kaj lignaĵ-metiejo, kiu zorgas pri riparo de ordinara agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, sukcese reformis disgrajnigilon, farunmuelilon kaj mem fabrikis draŝmaŝinon kaj grenokribran maŝinon. Daĝaj-brigado, kiu neniam bredis fiŝojn en la pasinteco, nun jam komencis tion fari.

Por akiri riĉan rikolton en trosekeca jaro





La disvolvigo de multflankaj entreprenoj ne nur estigis riĉrikoltojn de greno dum sinsekvaj jaroj, sed ankaŭ senĉese plifortigis la kolektivan ekonomion kaj pliigis la enspezon de komunumanoj jaron post jaro. Antaŭ 1968 la enspezo de multflankaj entreprenoj okupis 18% de la totala enspezo sed nun ĝi jam atingis ĉirkaŭ 40%.

KONSTRUO DE EBENAJ KAMPOJ PER MONTO-FORIGO KAJ VAL-PLENIGO

Daĝaj-brigado situas ĉe la piedo de Tajhang-montaro. Tie sur la altaj montoj estas nur malgrandaj terpecoj, kio kaŭzis multajn malfacilojn al la agrikultura mekanikigo. Sed la heroaj Daĝajanoj diris: Ni devas aktive krei kondiĉojn por elhaki vojon de agrikultura mekanikigo en montregiono! Ekde la vintro de 1970, ili ebenigas kampojn forigante montojn kaj plenigante valojn kun la spirito de montotranslokigo fare de Malsaga Avo. En Mahuang-valo ili sinsekve ebenigis naŭ montojn per buldozoj kaj plejparto de siaj homfortoj kaj elfaris grandan areon da bonaj kampoj, tiel krei kondiĉojn por plugado per traktoroj sur Hutoŭ-monto. Post tio, la partia filio de la brigado faris decidon daŭrigi montotranslokigon kaj valplenigadon ekde la vintro de 1971 kaj komenci la unuaperiodan konstruadon en Hoŭdi-valo.

Komenciĝis la konstruado. Kamarado Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio, kaj aliaj mem-

broj laboris kune kun komunumanoj sur la konstruejo. Tie navede kuris traktoroj, buldozoj kaj puŝĉaroj kaj samtempe ankaŭ homoj fosadis kaj portadis teron. Post trimonata penlaboro la monteto, kiu altas je pli ol 30 metroj, larĝas je pli ol kvindek metroj kaj longas je pli ol 500 metroj, kaj kelkaj grandaj teramasoj estis ebenigitaj kaj kvar valoj estis plenigitaj. La antaŭaj pli ol 20 muoj da agro en Hoŭdi-valo en pli ol 30 pecoj, nun estis transformitaj en ebenan kampon de pli ol 70 muoj.

De la lasta vintro, la komunumanoj de Daĝaj-brigado komencis reformadon de Langvoĝang-valo — la plej granda valo, por fari ĝin alia ebena kampo irigaciebla kaj plugebla per maŝinoj.

ANTAŬ SERIOZA KATASTROFO DE TROSEKECO

En 1972, Daĝaj renkontis trosekecon neviditan dum kelkdek jaroj. La pluvokvanto estis nur pli ol cent dek milimetroj, malpli ol kvinono en la normala jaro. Krom tio, ankaŭ muĝis ventego kaj frue aperis prujno. Kiel akiri riĉan rikolton antaŭ tia serioza katastrofo? La Daĝajanoj alfrontis novan provon.

En la pasinta printempo, kiam venis tempo por semado, mankis pluvo kaj preskaŭ ĉiutage muĝis ventego. La Daĝaj-a partia filio alvokas la komunumanojn: "Garantiu nemankecon de plantidoj sen pluvo en la tuta printempo, kaj akiru

riĉan rikolton sen pluvo en la tuta jaro.” Ĉiuj kadroj kaj komunumanoj tuj sin ĵetis en la batalon kontraŭ trosekeco por semado. Vektoportante akvon per sitejoj ili semadis pokave, kaj tiel garantiis ĝustatempan semadon de maizo. Tamen, trosekeco daŭre disvolviĝis. En la tempo por semado de milio, blovis ventego de kvin aŭ ses gradoj, tial sur la pli ol cent muoj da milio-kampoj nur duono de la semoj ĝermis. Komunumanoj kontrolis la kampojn parcelon post parcelo por aldoni plantidojn. Kiam la aldonitaj plantidoj mortis de sunumo, ili replantis eĉ tri- aŭ kvar-foje kaj tiel garantiis bonan kreskon de plantidoj sur ĉiuj milio-kampoj.


En la ŝlosila momento de spikiĝo de maizo ankoraŭ disvolviĝis sekeco, kaj la plantoj estis velkantaj pro forta sunumado. La Daĝaj-anoj daŭre kondukis obstinan batalon kontraŭ trosekeco. Ili diris: “La inundo de 1963 ne povis nin faligi, la hajlo de 1969 ne povis nin timigi, kaj ni certe povas venki la trosekecon de tiu ĉi jaro. Kiam estas trosekeco,

ni devas energie batali kontraŭ ĝi.” Gvidate de Song Lijing, vicsekretario de la partia filio kaj Guo Ajlian, estrino de la Virina Kongreso, virinoj de la tuta brigado prenis sur sin la taskon de sarkado. Ĉiufoje, post kiam viroj akvumis iun kampon, ili ĝin sarkas unufoje. En la antaŭaj jaroj, oni sarkis la maizajn kampojn maksimume je tri aŭ kvar fojoj, sed en la pasinta jaro sep aŭ ok fojoj.

Somere, la suno ardis kiel fajro. Gvidate de Gia Ĉangsuo, membro de la partia filio, timante nek penon nek lacon, la junulara sturma taĉmento, kiu prenis sur sin la taskon fosi kanalojn por irigacii kampojn, laboris dek diurnojn sur Hutoŭ-monto.

Reveninte de kunveno en la provinca urbo, kamarado Ĉen Jongguj tuj iris rekte al Hoŭdi-valo, anstataŭ sia hejmo. Demetinte la ŝuojn kaj supren faldinte la pantalono-tubojn li tuj eklaboris per fosilo. Iuj admonis lin: “Bonvolu unue ripozi, kamarado Ĉen, kaj lasi nin fari la laboron.” Kamarado Ĉen diris ridante: “Nur kiam mi ŝvitas kune kun vi, mi povas pensi same kiel vi.”

Daĝaj-anoj, kiuj neniam kulturis rizon, sukcese kulturis rizplantojn sur Hutoŭ-monteto. Jen ili rikoltas rizon.



En la tagoj de plej streĉa batalo kontraŭ trosekeco, eĉ la maljunuloj kaj infanoj de la vilaĝo ne povis sidi indiferente. Pli-ol-sesdekjara maljunulino Ĝang Deĵong kun kelkaj maljunulinoj sarkis herbaĉojn sur kampoj ĉe la fino de la vilaĝo. Ili eliris frumatene al kampoj kaj revenis vespere, ekstermis herbaĉojn per hojetoj, por ke fortaj laboruloj akvumu kampojn. Kondukate de instruistoj, ankaŭ pli ol cent lernantoj sin ĵetis en la vicaron kontraŭ trosekeco. Ili portas akvon unuope aŭ duope.

Per tia refleksebla spirito la Daĝaj-anoj venkis la seriozan trosekecon.

POST RIĈA RIKOLTO

En 1972, ĉe la piedo de Hutoŭ-monto aperis sceno de vigla laborado. Sur la draŝejo senĉese bruis draŝaj kaj kribraj maŝinoj, kaj ĉaroj ĉu grandaj aŭ malgrandaj veturadis tien kaj reen. Komunumanoj portis grenon al tenejoj kaj sur ĉies vizaĝo vidiĝis ĝojo pro la riĉa rikolto. Daĝaj-brigado ree akiris riĉan rikolton en produkto de greno kaj aliaj produktoj. La meznombra pomua produkto-kvanto de greno atingis 473.5 kilogramojn kaj la totala enspezo pliiĝis je 10% kompare kun tiu en 1971, jaro de abunda rikolto.

“Kion ni faru post la riĉa rikolto?” la demandon elmetis kamarado Ĉen Jongguj en la kunveno de komunumanoj.

“Kvankam ni akiris riĉan rikolton, tamen ni devas meti plian atenton al ŝparo. Ni devas vendi multe da greno al la ŝtato por subteni kaj helpi regionon trafitan de serioza katastrofo, subteni la konstruadon de la lando kaj la mondan revolucion.” Senhezite respondis maljunaj komunumanoj.

Kiel en la pasintaj jaroj ilia propono tuj ricevis aprobon de la tuta ĉeestantaro. La Daĝaj-anoj ĉiam tenas siajn vortojn. Ili vendis la plej bonan grenon al la ŝtato en pli multa kvanto ol tiu en la antaŭlasta jaro. Ĉiu familio starigis bonan moron de laŭplana kaj ŝparema uzado de greno. En la kolektiva grentenejo amasiĝas rezervataj tritiko kaj milio, kaj en la hejmoj de la komunumanoj estas rezervita greno, tamen ili manĝas maizo-farunaĵon miksitan kun legomo kaj per la ŝparita greno helpas regionon trafitan de serioza katastrofo. Brutobredistoj de la brigado antaŭlonge jam pensis pri ŝparo de furaĝoj. Somere ili paŝtis siajn ĉevalojn en malproksimaj montodeklivoj, kaj falĉis pli ol du cent mil kilogramojn da fojno. Aŭtune, iliaj muloj kaj ĉevaloj manĝis maizo-trunketojn, kaj per la ŝparitaj stakoj de miliotigoj kun pezo de kelkcent mil kg. ili helpis regionon trafitan de serioza katastrofo. Ili diris: “Kvankam ni ricevis riĉan rikolton, sed la popolanoj en regiono de serioza katastrofo havas pli multajn malfacilojn ol ni. Helpi ilin venki la malfacilojn estas nia plenumenda devo.”



Plumo de Majstro Jan

de VANG TIEJING

MALJUNA laboristo Jan Taŭ havas tre malnovan plumon, kies pinto jam malakriĝis. Li tamen ofte ĝin uzas.

Iufoje, mi kaj miaj kunlernantoj petis Majstron Jan rakonti al ni historion pri la revolucia tradicio.

“Bone,” diris li, eltirante la plumon, “mi do rakontu al vi la historion de tiu ĉi plumo!”

“Antaŭ la Liberiĝo, tre malriĉa estis mia familio. En la 7-jara aĝo mi fariĝis jam bovpaŝtisto de bienulo. Tiam mi vidis ke ĉiutage infano el la bienula

familio iras al la lernejo kun libro-saketo, kaj plumo en lia poŝo. Kiom mi soifis viziti lernejon kaj akiri plumon! Sed mi sciis, ke malriĉaj knaboj neniel povas viziti lernejon.

“Poste nian naskiĝlokon alvenis partizana trupo. En la trupo



troviĝis iu onklo Liu, ankaŭ li skribis per plumo. Kun granda admiro mi rigardis lian skribadon. Rimarkinte ke mi ŝatas plumon, li tuj konigis al mi la strukturon de plumo kaj preparolis kiel li laboras por revolucio per tiu plumo. Reveninte hejmen, mi insiste petis mian patron, ke li aĉetu por mi plumon. Karesante mian kapon, paĉjo diris: ‘De kie mi akiru monon, mia infano, por plumon aĉeti, se eĉ manĝo al ni mankas?’ Ekde tiam, mi ne plu tion faris. Sed la forta deziro de plumo restis ankoraŭ en la koro.

“Iun tagon, bovon tirante mi estis preteriranta fragmitan lageton ĉe la vilaĝ-fino. Subite venis en la kapon la ideo, ke oni povas fari plumon el fragmita tigo kaj la eluzita plumpinto, al mi donita de partizano onklo

Liu. Mi iris en la fragmitejon kaj poste eliris kun kelkaj tigoj. Sed kiu atendis, tion vidis fileto de la bienulo! Li kriaĉis, ke mi ŝtelis fragmiton de lia familio. Kaj poste eksciinte, ke mi volas fari plumon el fragmito, li insultis min dirante ke malriĉa almozulo, kia mi, eĉ permesas al mi revii pri uzo de plumo. Mi ege koleris kaj batis lin. La bienulo informiĝis pri tio kaj bastonis min. Mi estis elpelata kun sanganta kapo!

“En la jaro 1941, venis la Oka-voja Armeo kaj fondiĝis demokratia reĝimo en la vilaĝo. Ankaŭ mi ekvizitis lernejon. Iutage, mi trovis kuglingon ĉe la montpiedo ekster la vilaĝo. Mi ekĝojis pensante ke ĝi tre bone taŭgas por plumingo. Mi kuris hejmen kaj tranĉis langeton el bambuo. Poste mi alĝustigis ĝin kaj la eluzi-

tan plumpinton kune en la kuglingon. Trempinte ĝin en inkon mi skribis kelkajn ideografiajn jam ellernitajn: ‘Prezidanto Maŭ gvidas malriĉulojn batali por liberiĝo’. Kiel mi ĝojis pro tio!

“Iun tagon, onklo Vang, tre juna batalanto el la Oka-voja Armeo, instruis min koni ideografiajn. Li rimarkis mian plumeton kaj, post kiam mi rakontis al li la historion de ĝi, diris kun rideto: ‘Kiel elpensema estas vi, Taŭĉjo!’

“En la dua tago, la Oka-voja Armeo translokiĝis. Kun la samvilaĝanoj mi adiaŭis niajn fratajn soldatojn. Subite onklo Vang kuris al mi. Metante sian plumon en mian poŝon li diris: ‘Taŭĉjo, ni baldaŭ disiĝos, jen plumon al vi, diligente lernu kun ĝia helpo!’

“De tiam mi ĉiam uzis tiun ĉi plumon en lernado kaj laboro. Kaj nun mi domaĝas ĝin forlasi.”

Ĉiuj aŭskultintoj ricevis edukon el tiu rakonto kaj esprimis sian decidon heredi la gloran tradicion de la revoluciaj antaŭuloj kaj lernadi diligente.



Nova Fiŝista Vilaĝo

*Fiŝistaj domoj en profunda fragmitaro
kun muroj blankaj kaj tegoloj peĉkoloraj.
Leviĝas fumoj dum vespera manĝpreparo.
La sun' subira pentras nubojn ruĝaj, oraj.*


*Antaŭe: la fiŝistoj migris surrivere
kaj kreskis inter uraganoj kaj ondbatoj.
Malsupre akvo tralikiĝis de ekstere,
tegmentis supre fragmitar' kaj ĉifon-matoj.*

*Hodiaŭ: ili loĝas fikse sur la tero,
en brikaj domoj de fiŝista novvilaĝo,
loĝtaŭgaj tiel vintre kiel en somero,
sen timo al turment' de vent- kaj pluv-damaĝo.*

*Ĉi tie multaj lagoj kvazaŭ ŝakopecoj
kuŝas sur dense kunplektita river-reto.
La nova vilaĝeto sidas en lagmezo,
facile oni kaptas fiŝojn sen peneto.*

*Fiŝistaj lampoj tie kaj ĉi tie lumas
sur lag'; sub reto ŝatimas ondoj el arĝento.
La ruĝaj signallumoj vikle palpebrumas,
Granda l' Ursino brilas sur la firmamento.*

*La komunumo havas multajn membrojn, retojn;
ĉiuj fiŝkaptas verve por revolucio,
kun plena laborenergio kaj impeto.
En la fiŝistvilaĝo nun prosperas ĉio.*



Kantono — Fama Urbo en Suda Ĉinio


KANTONO estas la plej granda urbo en la suda parto de Ĉinio. Ĝi situas ĉe la norda rando de la Delto de Perlo-rivero kaj kuniĝejo de la Okcidenta Rivero, Norda Rivero kaj Orienta Rivero. La malsupra parto de Perlo-rivero enfluas en la maron ĉe Humen. Kantono troviĝas 35 kilometrojn sude de la Tropiko de la Kankro kaj en subtropika regiono. En tiu ĉi urbo abundas suno kaj pluvo kaj la klimato estas varma kaj la grundo fekunda. Tutjare prosperas tie arboj kaj floroj kaj pro tio la urbo estas nomata urbo de floroj.

Kaj la Delto de Perlo-rivero abunde produktas rizon kaj estas unu el la gravaj grenejoj de Ĉinio.

Sed, antaŭ la Liberiĝo, tiu bela loko troviĝis en tre malbona stato rezulte de regado kaj prirabado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Ĉe ambaŭ bordoj de Perlo-rivero regis mize-reco kaj teruro. La tiranado de imperiismo kaj subpremado de la nacioperfidaj kuomintangaj reakciuloj pelis la vastajn laborulojn en senelirejon, ke laboristoj grandnombre fariĝis senlaboraj kaj la kamparanoj forfuĝis aliloken por serĉi vivrimedon.

Laboristinoj de linia laborgrupo "3.8" de la Kantona Elektroproviza Kompanio, kiuj sukcesis libere labori sur alttensia linio kun 220,000-voltoj






Parto de la kantona industria distrikto

Laboristinoj de Kantona Brakhorloĝa Fabriko ekzamenas la kvaliton de maŝinpartoj.



Tia estis la fizionomio de Kantono en la malnova Ĉinio. Tiam Kantono estis pure konsumata urbo. De ĝi la imperiistoj forrabis grandan kvanton de materialoj kaj dumpingis en ĝi importitajn varojn. En la tiama merkato de Kantono tiel tormente inundis fremdlandaj varoj, ke Kantono tute ne povis disvolvi sian nacian industrion. Antaŭ la Liberiĝo ĝi povis produkti nek feron kaj ŝtalon nek maŝinojn. Kvankam ĝi havis plurajn riparejojn, metiejojn, fabrikojn de ĉitagaĵaj metalaj necesajoj, kc, tamen ankaŭ ili frontis bankroton sub detruado de imperiistoj kaj kuomintangaj reakciuloj.

Kie ekzistas subpremado kaj agredado, tie leviĝas rezisto kaj kontraŭbatalo. En la lasta jarcento, la heroaj popoloj de Kantono levis unu post alia grandan kontraŭimperiisman revolucionan ŝtormon kaj aperis multaj kortuŝaj heroaĵoj en batalo. Dum la Opia Milito en 1840, la loĝantoj de 103 *hiang*-oj (baza administra unuo) en la antaŭurbo de Kantono



organizis sin kaj donis fortan baton al agreso de imperiismo. La 27-an de aprilo, 1911, la Ligo de Revolucioj gvidata de D-ro Sun Jatsen faris en la urbo armitan batalon kontraŭ la regado de King-dinastio. La granda Komunista Partio de Ĉinio naskiĝis en 1921. Dum la Unua Enlanda Revolucia Milito, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong fondis tie en 1926 la Instituton de Kamparana Movado, kiu elkulturis grandan nombron da kadroj por la ĉina proletara revolucio. La revoluciaj fajreroj ekbruligitaj de Prezidanto Maŭ jam disportigis tra la tuta lando.

Kantono liberiĝis en la jaro 1949. Antaŭvespere de la Liberiĝo de la tuta lando, Prezidanto Maŭ Zedong jam prudente montris, ke ni bone kapablas ne nur detruiri la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui novan.


Observante la instrukciojn de Prezidanto Maŭ, la loĝantoj de Kantono persistis ĉe irado de la soci-

alisma vojo en spirito de sendependeco, sinapogo sur propraj fortoj kaj batalado en malfaciloj kaj konstruis novajn industriajn kvartalojn sur la dezertaj riverbordoj kaj virgaj montoj dormintaj en multaj jarcentoj.

Sude de Fenghuanggang sur la suda bordo de Perlo-rivero etendiĝas granda kaj rekta bulvardo kun longeco de pli ol 5 kilometroj. Sur ĝiaj ambaŭ flankoj sin lokas dekoj da fabrikoj kaj loĝkvartaloj kun dense kaj bone viciĝantaj domoj. Tie troviĝas ankaŭ la Kantona Paperfabriko kaj la Kantona Fabriko de Pezaj Maŝinoj fame konataj kiel "urbo de papero" kaj "urbo de maŝinoj". Antaŭ la Liberiĝo, Kantono produktis eĉ neniun pecon da ĵurnalpapero, sed nun la Kantona Paperfabriko jam fariĝis unu el la plej grandaj paperfabrikoj de Ĉinio. En 1972 ĝi antaŭdate plenumis la tutjaran produktan taskon, la produktokvanto atingis la plej altan nivelon de post sia fondiĝo kaj la kvalito de produktaĵoj multe pliboniĝis. La Kantona Fabriko de Pezaj Maŝinoj povanta produkti kompletojn da ekipaĵoj de kemia kaj sukerprepara industrioj estis agrikulturila riparejo en la komenca periodo post la Liberiĝo povanta fari nur ŝprucilojn, sed post penlaborado de pli ol 20 jaroj ĝi

Sperta laboristo faras prelegon pri tekniko al junaj gelaboristoj





Komercistoj el diversaj landoj kaj regionoj negocas en la vestafa salono de la Kantona Foiro.

jam kapablas produkti pli ol 700 specojn de maŝinoj inkluzive de mineja ekipaĵo kun pezo de pli ol 400 tunoj kaj centrifugilo kun rapideco de 15,000 revoluoj po minuto. La nombro de laboristoj kaj oficistoj de la fabriko kreskis 25-oble kaj ĝia areo pligrandiĝis 20-oble. De 1970, la fabriko superplenumis la produktajn planojn de la ŝtato en sinsekvaj jaroj.

En tiu ĉi loko disvolviĝas la peza industrio kune kun la malpeza industrio, senĉese aperis novaj produktaĵoj, novaj ekipaĵoj kaj novaj teknikoj, kaj miloj kaj miloj da laboristoj kaj oficistoj kun siaj familianoj gaje laboras kaj vivas. Ĉi tie fondiĝis ne nur magazenoj, legomvendejoj, poŝtejoj, bankoj, hospitaloj, lernejoj kaj librejoj, sed ankaŭ parkoj, bibliotekoj, kinejoj kaj kluboj.

Por utiligi riĉfontojn de Suda Ĉinio starigis en ĝiaj aliaj antaŭurboj fabrikoj de sukeraĵoj, konservaĵoj, silko, artefarita fibro kaj parfumoj respektive kun fruktoj, sukerkanaĵoj, kanabo kaj aromaj floroj kiel materialoj. Antaŭe Kantono provizis sin per karbo transportita de aliaj lokoj, sed nun en la norda antaŭurbo jam troviĝas karbominejo.

Kantono, antaŭe konsumata urbo, nun jam fariĝis socialisma industria urbo. Ĝi havas industriojn de fero kaj ŝtalo, ŝipkonstruado, maŝinoj, kemio, elektrono, teksaĵo, papero, aŭtoj, agrikulturaj maŝinoj kaj metaloj. La de ĝi produktitaj precizaj maŝinoj, ŝarĝaŭtoj, radiaparataj partoj kaj maŝinoj de agrikulturo kaj malpeza industrio ne nur havas debiton enlande sed ankaŭ estas eksportataj.


Kiel fame konata haveno por eksterlanda komerco kaj amikeca urbo de Ĉinio, Kantono nun jam pli multe prosperas. En aŭtuno de 1972, la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj akiris senprecedencan sukceson. Ĝi akceptis sume pli ol 23,000 fremdlandajn amikojn, elmigrintajn ĉinojn kaj samlandanojn en Hongkong kaj Aŭmen venintajn por ĝin rigardi kaj fari negocon. La nombro de vizitantoj estis rekorda kaj la totala valoro de la faritaj negocoj superis tiun de la samjara printempa foiro.


Kun la rapida disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo de Ĉinio kaj la plivastiĝo de ĝiaj eksterlanda komerco kaj internacia amikeca interkontaktiĝo, al Kantono certe okazos pli kaj pli novaj ŝanĝoj.

Kantonio

Fotoj de nia redakcio







Nokto


La interna haveno Huangpu






La nova kvartalo de antaŭaj surkvaj loĝantoj. Antaŭ la Liberiĝo la surkvaj loĝantoj vivis en ŝipoj de generacio al generacio, sed nun la ŝtato konstruis por ili multajn loĝejojn. Multe pliboniĝis ilia vivo.






La antaŭa Instituto de Kampana Movado de Kantono, persone fondita de Prezidanto Maŭ Zedong en 1926, kiu kulturis multajn revoluciajn kadrojn.



La halo kaj monumento starigitaj memore al Sun Jatsen

La pitoreskejo Conghua kie sidas multaj sanatorioj





Legomĝardeno de iu antaŭurba komunumo

Riĉa Rikolto

de Kotonono

ANTAŬ la 22-a aŭ 23-a de novembro la kotonono sur kampoj en la regiono de Dongting-lago, laŭ la malnova kutimo, devas esti rikoltita. Sed je tiu tempo en 1972, la kotonkampoj de Songhu-brigado de la komunumo Anfu en Anhiang-gubernio ankoraŭ portis multajn fruktojn kun montrata kotonlanugo. Tio estis rezulto de diligenta laboro kaj scienca eksperimentado fare de la amasoj sub la gvido de Tang Ĉunjin, sekretario de la partia filio de la brigado kaj tutlanda agrikultura labor-modelo.

KOMENCO

La eksperimenta aktivado de Tang Ĉunjin por pliprodukto de kotonono startis jam en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Estis la tria jaro post la Liberiĝo. En tamburado kaj tamtamado por festi la venkon de la agrara reformo Tang Ĉunjin organizis, responde al alvoko de la Partio, 6 familiojn de kamparanoj en interhelpan grupon, kiu kulturis 25 muojn da kotonono en la unua jaro post sia fondiĝo. Tiujare abundis pluvo, kio kaŭzis seriozan mankon de kotonplanditoj en la kampo. Pro tio Tang Ĉunjin maltrankviliĝis kaj pensis: "Ni nepre klopodos, por ke la ĵus ricevita tero donu riĉan rikolton por respondi al la favoro de Prezidanto Maŭ." Sub lia gvido ĉiuj grupanoj sin ĵetis en transplantadon de planditoj. Dank' al tio riĉa rikolto de kotonono estis

akirita. Tang Ĉunjin ĝojegis pro tio kaj sendis leteron al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ por raporti la akiritan sukceson. La oficejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al li respondis per letero por lin gratuli. Li estis multe kuraĝigita de tio kaj decidis pluapaŝe fari eksperimentadon por ke la pomua produktokvanto de kotonono kresku kelk- ĝis dekelk-oble, kaj fari sian kontribuon por konstrui nian patruon en landon fortan kaj prosperan. En 1957, la pomua produktokvanto de sensemigita kotonono de lia produkta grupo jam superis 50 kilogramojn.

KREO DE NOVO

Kun scienca sinteno kaj diligenteco en praktiko, Tang Ĉunjin iom post iom akumulis spertojn por akiri altan produktokvanton de kotonono.

Antaŭe, en la regiono de Dongting-lago oni semis kotonon ĝenerale en la unua tagdeko de majo. La plantoj kreskis altaj, tamen la pomua produktokvanto estis malalta pro malfrua butoniĝo kaj malmulteco de kotonfruktoj. Leginte meteorologiajn materialojn de la pasintaj jaroj, Tang Ĉunjin trovis, ke ĉiujare la meznombra temperaturo de aprilo en la loko estas 16°C, kio tre taŭgas por kreskado de kotonono. Post kuna analizado pri la lokaj kondiĉoj la membroj de la scienc-esplora grupo konstatis, ke konvene fruiĝi la semtempon povos plifruigi ĝermadon de kotonsemo kaj ebligi al koton-

plantoj multe frukti en la varmaj tagoj de la tria tagdeko de junio ĝis tiu de julio. Rompinte la malnovan rutinon, en 1959 ili semis kotonon sur du muoj da tero unu monaton pli frue ol antaŭe.

Post pli ol dudek tagoj, la semoj ĝermis kaj elkreskis el la tero. Tamen neatendite la plantidoj trafis pluvadon en sinsekvaj tagoj en la lasta tagdeko de aprilo kaj pro tio fariĝis senfoliaj. Tiam la homoj kiuj dubis pri ŝanĝo de la semtempo diris: “Estas pli bone semi kotonon laŭ la malnova kutimo.” Tial ili pledis por denova semado. Kiam Tang Ĉunjin ŝanceliĝis, la gubernia vicsekretario veninta tien por helpi labori diris al li kuraĝigante: “Tio estas ne nur renovigo en kulturado de kotonon sed ankaŭ revolucio en ideologio kontraŭ la konservativaj pensoj. Tangĉjo, vi ne devas ŝanceliĝi tuj post renkontiĝo kun malfaciloj. Vi povas venki ĉiujn malfacilojn kiel ajn grandaj ili estas, nur se vi bone vin apogas sur la amasoj.” La diro de la vicsekretario tuj firmigis lian memfidon pri la afero. Li iris en la amasojn kaj interkonsiliĝis kun

ili. Iu maljuna malriĉkamparano diris al li: “En 1950 ankaŭ mi pli frue semis kotonon sur mia kampo sed la plantidoj estis atakitaj de pluvo kaj fariĝis senfoliaj krom kelkaj nedifektitaj. Tiam mi semis denove laŭ la tradicia semtempo, kaj poste je rikoltado mi rimarkis, ke tiuj fruaj plantoj fruktis pli multe ol la aliaj.” La vortoj multege kreskigis lian memfidon persisti ĉe la eksperimentado. Li persvadis la aliajn restigi la damaĝitajn plantidojn kaj transplanti novajn al lokoj vakantaj kaj zorgeme ilin flegis. En la unua tagdeko de majo, elkreskis plantidoj sur aliaj kotonkampoj prisemitaj malfrue laŭ la malnova kutimo. Tang Ĉunjin kaj kelkaj komunumanoj venis al la kampoj, eltiris kelkajn kotonplantidojn de malsama semtempo por ekzameno kaj rimarkis, ke la fruaj plantidoj estas malgrandaj pro pluvo, tamen iliaj radikoj estas multaj kaj longaj; dum la malfruaj plantidoj estas altaj, sed iliaj radikoj estas malmultaj kaj mallongaj. Tang Ĉunjin memoris proverbon pri agrikulturo: “Ju pli multas radikoj, des pli prosperas plantoj”, kaj certiĝis pri bona kreskado de la fruaj

Tang Ĉunjin (la dua de maldekstre) kaj komunumanoj kune selektas kotonsemojn.



plantidoj. Dum la meza kreska periodo de kotonono oni povis klare vidi, ke la fruaj kotonplantoj kreskas prospere kun densaj branĉoj kaj butoniĝis frue; ankaŭ la malfruaj kreskas prospere, tamen kun pli multaj branĉoj senfruktaj kaj butoniĝis malfrue. Post la rikoltado oni konstatis, ke la pomua produktokvanto de sensemigita kotonono de la du muoj da fruaj kotonplantoj estis 106 kilogramoj t. e. je 60% pli multe ol tiu de la aliaj kotonkampoj.

Tang Ĉunjin tre ĝojis pro la sukceso, tamen li ne kontentiĝis je ĝi. Rigore observante la instruon de Prezidanto Maŭ "eltrovi veron tra praktiko, denove tra praktiko pruvi kaj disvolvi veron", li komencis ekzameni la ĵus rimarkitan veron tra praktiko. Li kaj la aliaj membroj de la grupo decidis semi kotonon en kvar terpecoj je malsamaj tempoj por trovi la tempon plej taŭgan por semado. Tiamaniere ili kaj ŝanĝis la malnovan kutimon semi kotonon en la unua tagdeko de majo kaj venkis la eraran opinion — semi ju pli frue, des pli bone, kaj trovis taŭgan tempon por semado en la regiono de Dongting-lago.

NOVA ATINGO

Post akiro de la unuapaŝa sukceso supre dirita, aperis antaŭ Tang Ĉunjin nova tasko strebi plue por gajni pli altan produktokvanton per multigo de aŭtunaj kotonfruktoj.

Kotonono unue donas somerajn fruktojn kaj poste aŭtunajn. Aŭtunaj fruktoj aperas post la 8-a aŭ 9-a de aŭgusto. En la regiono de Dongting-lago, post la 23-a aŭ 24-a de julio, la malsupra parto de la verdaj tigoj de kotonplantoj ruĝiĝas, kaj oni opinias, ke tiam ili jam maljuniĝas kaj ne povas plu doni multan kotonon, eĉ se ili donas kelkajn fruktojn. Tial en la pasinteco oni ĉiam atentis nur la somerajn fruktojn sed ne la aŭtunajn.



La kotonujo kun 42 branĉoj kaj pli ol 620 fruktoj kune kulturita de Tang Ĉunjin, kadroj kaj komunumanoj

Ĉu pro maljuniĝo kotonono ne povas multe frukti en aŭtuno? En iu jaro, abundis pluvo post la 9-a de aŭgusto kaj estis varme kaj humide. Tang Ĉunjin trovis, ke la malsupra parto de la koton-tigoj restis verdaj kaj tiujare la aŭtunaj fruktoj estis pli multaj ol antaŭe. La eksterordinara fenomeno donis al Tang Ĉunjin grandan inspiron. Li ekkomprenis, ke la kotonplantoj fariĝis ruĝaj post la 24-a de julio ne pro maljuniĝo sed pro tio ke oni ne donis sufiĉan atenton al sterkado kaj flegado. Li kredis, ke estas eble longigi la vivon de la kotonplantoj kaj multigi aŭtunajn fruktojn, se oni plibonigas la flegadon kaj sterkas kaj akvumas ilin ĝustatempe.

Alia grava favora kondiĉo estas, ke ekzistas en tiu regiono longa senprujna periodo de 230 tagoj, kiu sufiĉas por kreskado de kotonono, dum la vivo de la tiea kotonono povas daŭri nur 180 tagojn. Post



Tang Čunjin observas fiinsektojn en nokto por efike ilin ekstermi.

interkonsiliĝo kun la aliaj membroj de la scienc-esplora grupo Tang Čunjin decidis fari novan sciencon eksperimentadon, nome daŭre sterki kaj zorgeme flegi kotonkampojn post la 24-a de julio, tiel longigi la kreskan tempon de kotono ĝis 220 tagoj, por ke kreiĝu favoraj kondiĉoj por akiri riĉan rikolton per multigo de aŭtunaj fruktoj.

Lernante bonajn spertojn de aliaj lokoj kaj agante laŭ la lokaj cirkonstancoj ili faris multajn aranĝojn, kiaj estis raciaj sterkado kaj irigaciado, kaj ankaŭ eliminado de fiinsektoj, fine ili sukcesis multigi aŭtunajn fruktojn.

Post ripetada eksperimentado dum du jaroj, Tang Čunjin kaj aliaj grupanoj fine akiris riĉan rikolton per multigo de aŭtunaj fruktoj en 1970. La nombro de aŭtunaj fruktoj sur la eksperimentaj kampoj de altprodukto plimultiĝis je pli ol 50% kompare kun tiu antaŭ la renovigo, kaj la pomua produktokvanto de sensemigita kotono superis 150 kilogramojn. Ankaŭ la komunumoj kaj produktaj brigadoj en la ĉirkaŭaĵo akiris stabilan kaj altproduktan rikolton dank' al apliko de la progresinta kotonkultura sperto akumulita de Tang Čunjin kaj la aliaj membroj de la scienc-esplora grupo.

NOVTIPA VARMIZOLA MATERIALO

Speco de novtipa tre malpeza, varmizola materialo, ŝvela perloŝtono, estis sukcese fabrikita kaj pogrande produktata de la Dalian-a Fabriko de Fajrorezistaj Materialoj. La produktaĵoj estas liveritaj al pli ol 20 provincoj kaj urboj por kontentigi la bezonon de metalurgiaj, kemiaj kaj elektraj industriaj entreprenoj en konstruado kaj riparado de alttemperaturaj, fridaj kaj varmizolaj instalaĵoj.

Perloŝtono estas acida erupciaĵo, kogaŭliĝinta en vitreca roko kun formo de perloj. Nia lando havas tre riĉan fonton de ĝi. Ŝvela perloŝtono estas farita el tia materialo laŭ jena procedo: dispecigo, antaŭvarmigo, bakado kaj ŝveligo. Ĝi estas pli malpeza, pli varmizoliva, taŭga por pli vasta uzo, pli malkara kaj sekura kaj facile masonebla kompare kun korko, silicia gelateno kaj asbesto.

RIĈA RIKOLTO DE TEO EN JUNNAN

En la jaro 1972, Junnan-provinco ricevis pliprodukton de teo. La totala kvanto de la aĉetita teo de tiu provinco pliiĝis je 11.8% kompare kun tiu de 1971. Ankaŭ la kvalito estis rimarkinde altigita kaj la kvanto de norma teo pliiĝis je dek procentoj kompare kun tiu de 1971.

Junnan estas unu el la ĉefaj te-produktejoj de nia lando. Ĝiaj famaj teoj Dianhong, Dianking, Tuoĉa kaj Puer estas multe ŝatataj pro dikeco, juneco, bonodoro kaj plaĉa gusto de la folioj.

En la pasinta jaro, Junnan konstruis pli ol 30 unuapaŝajn te-preparejojn kaj liveris pli ol 220 diversajn maŝinojn por preparo de teo. En la pasinta jaro, la fabrikoj de agrikulturaj instrumentoj, te-preparejoj kaj iuj komunumoj kaj brigadoj faris en la tekultura regiono multajn te-preparajn maŝinojn, dank' al kio efektiviĝis mekanikigo aŭ duonmekanikigo de preparado de teo.

Vicprofesorino Vu Hiuĵong

JAM en profunda nokto, ankoraŭ brilas lampo en ĉambro provizita per multaj libroj kaj sliparoj. Tie vicprofesorino Vu Hiuĵong, estrino de la instrua kaj studa grupo pri farmakologio de la Ĝongŝan-a Medicina Instituto de Guangdong, absorbite konsultas la slipojn por verki en kunlaboro de frataj unuoj libron *La Venenaj Serpentoj en Ĉinio kaj Prevento kaj Kuraco de Iliaj Mordvundoj*. Dum la lastaj jaroj ŝi jam verkis kelkajn farmakologiajn raportojn pri drogoj kontraŭ serpenta veneno kaj pri drogherboj por kuraci koronarian kormalsanon. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, en la jaroj 1968 kaj 1969 Vu Hiuĵong kaj kelkaj junaj instruistoj sin organizis en scienc-esploran grupon, kaj venis al Hajnan-insulo por partopreni la socian praktikon. Tie ili prenis laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kiel siajn instruistojn, kaj tiel suriris la novan vojon de scienca esplorado.

La montaj regionoj de Hajnan estas trezorejo de drogherboj. Iun tagon, nelonge post sia alveno, Vu Hiuĵong ricevis la taskon savi fiŝiston, mortdanĝere morditan de venena serpento. Veninte al la loko post transgrimpo de montoj, ŝi trovis ke senĉese sangas la okuloj kaj buŝo de la paciento kaj foje eĉ ĉesis bati lia koro. La maltrankvila homamaso ĉirkaŭ la vundito turnis esperplenan rigardon al tiu vicprofesorino. Sed ŝi ne havis klinikan sperton pri kuracado de tia vundo. Kvankam ŝi kunportis iun recepton, tamen pri ties efiko ŝi ankoraŭ ne estis certa. Konsiliĝinte kun aliaj kuracistoj ŝi aplikis sangotransfuzon al la paciento kaj apenaŭ eldanĝerigis lin.

Revenvoje ŝi pensis en si ke pri medikamento kontraŭ serpenta veneno ŝi studis jam pli ol dek jarojn, tamen ĝis nun ŝi ankoraŭ ne sukcesis trovi efikan rimedon por kuraci vunditon de venena serpento. La Partio multe donis al ŝi zorgon kaj

edukon, sendante ŝin alilanden por fari studon kaj taskis al ŝi trovi rimedon kontraŭ serpenta veneno post ŝia reveno al la patrolando. Ĉar ŝi koncentris sian studadon ĉefe en la teoria flanko de serpenta veneno, tial kvankam ŝi pasigis 7-8 jarojn en laboratorio, tamen ĝis nun, ŝi ankoraŭ ne povis liveri definitivan recepton por produktado. Ŝi ekkonis, ke en scienc-esplorado pri ĉinaj drogherboj, ŝi povos pli bone servi al la popolo nur se ŝi serioze reformos sian mondkoncepton kaj translokigis sian starpunkton al la flanko de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

De tiam, Vu Hiuĵong kune kun sia grupo eniris profundan montregionon kaj vizitis drogherbajn kaj serpentvundajn kuracistojn por kolekti

Vu Hiuĵong observas influon de medicinaĵo al koronariaj arterioj kaj elkora sangokvanto.



popolajn esoterajn receptojn kaj enketi simptomojn de mordvundo de venena serpento. En tio ili faris scienc-esploradon kaj lernis de laboruloj peneman kaj modestan laborstilon. Ili mem konstruis pajlan kabanon kaj faris en ĝi sciencan eksperimentadon per simplaj instrumentoj. Foje, la grupo preparis iun injektaĵon kaj bezonis provi ĝin. Kiel partiano kaj respondeculo de tiu laboro, Vu Hiuĵong decidis ke la provo devas esti farota sur ŝia korpo, malgraŭ ke al ŝi iam okazis anafilaksia ŝoko pro iu injektaĵo. Senhezite ŝi iris al proksima kuracejo por fari tie la provadon. Estis konstatite ke la injektaĵo ne kaŭzas reakcion, ĝi estis liverita por klinika aplikado.

Post nelonge, en kunveno okazigita en Kantono por interŝanĝi spertojn pri studo de medikamento kontraŭ serpenta veneno, oni staris ĉirkaŭ Vu Hiuĵong por rigardi interesan eksperimenton. Ŝi faris al ses viglaj blankaj musoj hipoderman injektadon de iu serpenta veneno unu post alia. Post momento ĉiuj ĉi tiuj musoj mortis senescepte post kelkaj konvulsioj. Nun ŝi alportis ses aliajn, al kiuj ŝi manĝigis unue antaŭe preparitan drogherban dekoktaĵon kaj poste injektis al ili la saman venenon. Sed, ĉifoje tiuj bestetoj restis sanaj. La eksperimento interesis la ĉeestantojn: Ja vere bonefika estas tiu ĉi drogherba dekoktaĵo! Ĝi estas preparita laŭ recepto trovita kaj reformita el granda nombro da receptoj, kiujn Vu Hiuĵong kaj ŝiaj grupanoj kolektis sur Hajnan-insulo.

Kiel trakti sian profesion scion? Ĉu kiel sian privatan proprajon aŭ senrezerve transdoni ĝin al la junuloj? Tiun problemon ofte pripensis Vu Hiuĵong dum la scienca esplorado en la lastaj jaroj. Pri tio ŝi faris ĝustan respondon per siaj agoj.

Foje, en la laboratorio, Vu Hiuĵong instruis al junaj instruistoj kaj teknikistoj operacion de elprenado de cerbo de kato. Ŝi faris kaj operacion kaj klarigojn: en dekelkaj minutoj ŝi jam lerte elprenis la tutan cerbon kaj la junuloj ĉiuj komprenis el ŝiaj atentigoj kaj demonstrado la ĉefajn postulojn de la operacio. Poste, ŝi lasis ilin unu post alia fari praktike la operacion kaj servis kiel asis-



Vicprofesorino Vu Hiuĵong kolektas drogherbojn kun gekamaradoj.

tantino, kaj de tempo al tempo memorigis al ili la atentindaĵojn, ĝis kiam ĉiuj posedis la teknikon.

En la pasinteco, Vu Hiuĵong prizorgis nur sian studobjekton. Post la hardado en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj socia praktiko, ŝi iom post iom komprenis ke por adapti la sciencan teknikon al la bezonoj de rapida disvolviĝo de socialisma afero, ne sufiĉas klopodoj de malmultaj personoj, oni devas mobilizi la amasojn kaj helpi la junulojn rapide kreski en ideologio kaj tekniko. De tiam, ŝi rigardas kulturadon de junuloj kiel gloran taskon asignitan de la Partio kaj nerifuzeban devon por maljuna sciencisto. Ĉifoje, kiam ŝi ricevas scienc-esploran taskon, ŝi serioze studas kune kun aliaj grupanoj ekde planado ĝis ĝia efektivigo kaj en ĉiu paŝo instigas ilin cerbumi kaj plirapide kapti la fundamentajn punktojn pri la studota temo. En la tempo por lernado, ŝi alportas al la grupanoj diversajn materialojn kaj literaturojn bezonatajn por la plenumata scienc-esplora tasko, por ke ili senĉese altigu sian teorian nivelon. Cetere, ŝi ankaŭ humile lernas de la junaj kamaradoj.

Vu Hiuĵong jam faris ĝojindan paŝon sur la nova vojo de scienca esploro. Ŝi decidis pli diligente labori per sia scio por fari pli multan kontribuon al la popolo kaj revolucia afero.

Kuracejo sur Insulo

VESPERIĜAS, kaj la vento pli kaj pli fortiĝas. Furiozas ondegoj sur la maro. Jen du kuracistoj, kiuj laboras en la komunuma kuracejo de Hijang-insulo de la gubernio Hiapu, Fugian-provinco, saltas sur boaton, por savi malsanulon kies vivo estas en danĝero. La boato flugas rekte al malproksima insuleto, fendante furiozajn venton kaj ondojn.

De pli ol dek jaroj, la kuracistoj de tiu kuracejo klopodas fervore por preventi kaj kuraci malsanojn por la fiŝistoj sur la insulo.

La kuracejo de la insula komunumo havas kuracistojn, flegistojn kaj administrantojn, sume ok personojn. Komence la junaj kuracistoj povis kuraci nur ordinarajn oftajn malsanojn kaj, renkontinte malfacile prognozeblan malsanon, ili devis transsendi la pacienton al hospitalo sur la kontinento. Foje oni alportis de iu insuleto malsanulon anhelantan pro empiemo en kriza fazo. Por kuraci tian malsanon, mankis tiam specialaj kuracaj aparatoj en la komunuma kuracejo, kaj krome ĝiaj kuracistoj ne havis tian sperton. Se oni portus la malsanulon al hospitalo sur la kontinento, li mortus survoje pro tangado sur la maro. Tial, ili decidis kuraci lin sur la insulo. La kuracistoj kune faris diagnozon kaj ripetitan esploron kaj fine decidis fari torakan punkcian operacion laŭ la tiama terapia kondiĉo. Ĉiuj en la kuracejo ekagis en strikta kunlaboro. Ili fine sukcese eliminis al la malsanulo pli ol 3,800 mililitrojn da sango kaj puse kaj purigis la torakon. Dank' al tio, la malsanulo rapide liberiĝis de danĝero kaj iom post iom resaniĝis. Post tio, la kuracistoj en la kuracejo des pli kuraĝe praktikadis, diligente studadis, atente resumadis klinikan sperton kaj ilia terapia nivelo sen-

ĉese altiĝis. Nun la kuracistoj de tiu kuracejo, ĝenerale ellernis akupunkturan anestezon kaj aliajn antaŭe nesciatajn kuracajn teknikojn kaj povas ne nur kuraci oftajn malsanojn, sed ankaŭ fari relative malsimplajn operaciojn. En la lasta jaro, ili faris operaciojn al 166 malsanuloj kaj ĝenerale atingis rezulton de mallonga procedo, alta efiko kaj rapida cikatriĝo.


En la preventado kaj kuracado de malsanoj por la vastaj amasoj de fiŝistoj, la kuracistoj de la kuracejo de la insula komunumo tutkore kaj tutanime servas al la popolo, prenante Norman Bethune kiel brilajn ekzemplon. Foje, aperis grandkvanta hemoragio al komunumanino Lin Saj-e post aborto. Kiam komunumanoj portis ŝin en la kuracejon, ŝi troviĝis jam en serioza stato de senkonscio. Kontraŭ tio oni devis transfuzi grandan kvanton da sango por fari poste operacion. Sed en la kuracejo troviĝis ne tiom da sango. Tiam, kuracisto Miaŭ Ŝaŭ-an, membro de la Komunista Partio, ekmemorinte ke lia sang-grupo identas al tiu de la malsanulino, tuj etendis sian brakon kun kuspita maniko. Kaj lia freŝa sango fluis en la korpon de la klasa fratino.

Iun tagon en septembro, 1972, dokisto Ĝan Muli sputis multe da sango kaŭze de grava ftizo. Por eviti al la malsanulo pluan sangosputon la kuracistoj de la kuracejo decidis loki klinikan liton en la domo de la malsanulo. Tage kaj nokte ili flegis lin, observadis fazojn de lia malsano kaj ĝustatempe injektis aŭ transfuzis al la paciento. Fine post multaj klopodoj kaj atentema flegado Ĝan Muli ĉesis sputi sangon kaj trapasis la danĝeron. La kuracistoj en la kuracejo de la insula komunumo, serioze efektivigante la proletaran linion de Prezi-

danto Maŭ pri medicino kaj higieno, disvolvas amasajn preventon kaj kuracon de malsanoj. Ili vizitas fiŝistajn domojn por kuraci malsanon kaj sendi medikamenton. Krom tio ili ankoraŭ starigis kurson de kamparanaj kuracistoj kaj elkulturis jam 20 kuracistojn por ĉiuj brigadoj sur la insulo. Ili eledukis 380 gesanitaristojn por ĉiuj fiŝistaj ŝipoj kaj milica roto sur la insulo, persistante en metodo de kolektiva eduko kaj alterna eduko kaj helpis al ĉiuj insuletoj establi kooperan kuracadon. En ĉiu ŝipo instaligis sanitara kesto. Por kolekti esoterajn popolajn receptojn la kuracistoj vizitas la popolamasojn de ĉiuj insulaj vilaĝoj, spite al peno kaj laco. Ili grimpas sur krutaĵojn por trovi drogherbojn. Ili jam kolektis pli ol 100 specimenojn de drogherboj. Ili kompilis skribis broŝuron "Poŝlibro pri Herbdrogaj Receptoj de la Insuloj" kaj popularigis ĝin inter la amasoj. Ĉiufoje kiam venas sezono de epidemio sur la insuloj, ili mobilizas la amasojn iri sur montojn por kolekti drogherbojn kaj poste portas dekoktitan medikamenton al ĉiu familio kaj tiamaniere efikoplene preventis aperon kaj cirkuladon de malsano. Neniun loketon po-

vis trovi jam la malario k.s. frekventintaj la insulojn en la pasinteco, post la senlaca klopodado de la kuracistoj. Kaj la ĉinorinkozo, kiu antaŭe danĝerigis la vivon kaj sanon de la popoloj sur la insuloj, jam ege reduktiĝis. Estas pluaparte garantiita la sano de la fiŝistoj de la insula komunumo kaj ilia farto evidente pli boniĝis, dank' al la disvolviĝo de la koopera kuracado, al la disvastigo de akupunktura terapio kaj vasta apliko de drogherboj, al la plibonigo de la higienaj kondiĉoj kaj perfektigo de kuracaj instalaĵoj en la komunuma kuracejo.

Alvenas fiŝ-sezono. Fore de Hijang-insulo, konkuras miloj da veloj kaj glimbriladas skvamoj. Ĉie promesiĝas riĉa rikolto. Svarmas sur la marsurfaco fiŝistaj ŝipoj, alvenintaj de diversaj lokoj sur la bordo de la sud-orienta maro, persekutante fiŝarojn. Ĝuste tiam, la kuracistoj el la kuracejo de la insula komunumo estas tre okupataj. Forlasinte insulon ili eniras ŝipojn por fari kuracon kaj sendi medikamentojn al la komunumanoj batalantaj sur la fronto de la fiŝada produktado. Iliaj fortoj fandiĝas kun tiuj de la vastaj amasoj de fiŝistoj en la socialisma konstruado.





Amika Vizitado

de ĜANG VENJU*


LA Delegacio de Ĉinaj Sciencistoj vizitis, en la periodo de oktobro ĝis decembro de 1972, sinsekve Brition, Svedion, Kanadon kaj Usonon. Mi tre ĝojas ke mi vizitis tiujn landojn kiel membro de la delegacio kaj iom kontribuis por akceli la interkomprenon kaj pliigi la amikecon inter la sciencistoj. Dum la vizitado, ni ricevis ekstreme varman kaj amikan bonvenigon kaj akcepton de diverslandaj kolegoj kaj tio donis al mi neforgeseblan impreson.

EN LA MARO DE AMIKECO

Dum pli ol 70 tagoj, ni vizitis 23 urbojn, multajn universitatojn, sciencajn institutojn kaj laboratoriojn de tiuj kvar landoj. Ĉie kien la delegacio iris, ĝi estis bonvenigata kaj akceptata persone de gvidantoj de la tieaj sciencaj rondoj.

Britio estas la unua lando de ni vizitita. En Britio la delegacio ricevis tre varman kaj amikan akcepton de la britaj kolegoj. Krom vizito de sciencaj institutoj ni ankaŭ diskutis kun britaj sciencistoj pri sciencaj problemoj kaj sate babilis pri la amikeco inter la popoloj kaj sciencistoj de niaj ambaŭ landoj. Sinjoro Alan Hodgin, prezidanto de la Reĝa Societo de Londono, persone akompanis nin viziti sciencajn institutojn en Kembriĝo, kaj li kune kun ni revenis al Londono je la 24-a horo en profunda nokto. Tio forte kortuŝis nin.

Svedio estas lando kun longa historio kaj kultura tradicio en Norda Eŭropo. Kaj kontaktiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Svedio jam okazis en la 17-a jarcento. La svedaj kolegoj tre ĝojis pro nia alveno. Tie ni ricevis varmegan akcepton de Profesoro C. G. Bernhard, prezidanto de la Reĝa



Akompanate de Profesoro Lee Grodzins, Profesoro Ĝang Venju vizitas altenergian laboratorion de MIT.



La Delegacio de Ĉinaj Sciencistoj kun Bernhard (la dua de maldekstre), estro de la Reĝa Sveda Akademio de Sciencoj, kaj Gunnar Hambraeus (la unua de maldekstre), la administra direktoro de la Reĝa Sveda akademio de Inĝeniera Scienco

Sveda Akademio de Sciencoj, Profesoro Gunnar Hambraeus, la administra direktoro de la Reĝa Sveda Akademio de Inĝeniera Scienco. Profesoro Hambraeus invitis nin ĉeesti la jaran kunvenon de la akademio. En sia inaŭgura parolado por bonvenigi nin, lia unua frazo citis en la ĉina lingvo jenon el la verko de Prezidanto Maŭ *Pri Popol-demokratia Diktaturo* ke **“Eksterlande, unuiĝi en komuna batalo kun tiuj nacioj en la mondo, kiuj nin traktas kiel egalulojn kaj kun la popoloj de ĉiuj landoj”**. Por lerni tiun frazon, li speciale petis en la antaŭa tago laboranton de la ĉina ambasadorejo en Svedio instrui lin. Antaŭ nia forlaso de Svedio, li gastame invitis nin al lia hejmo kaj nin varme regalis lia tuta familio, kaj per tio sentigis al ni multan intimecon. En Upsalo, la lulilo de la sveda kulturo, la urbestro bonvenigis nin per la tradicia ceremonio per kiu oni bonvenigas ordinare la plej honorajn gastojn. Informiĝinte ke la ĉinaj sciencistoj vizitos la Instituton de Geofizikoj en Kiruna, ĝia estro speciale revenis de Usono por akcepti la ĉinajn gastojn.

En Kanado, la hejmloko de Doktoro Norman Bethune, ni ricevis varman akcepton de Profesoro Evens, rektoro de la Universitato de Toronto, antaŭaj amikoj de Bethune kaj multaj aliaj kanadaj amikoj. La vicministro de la Ministerio de Ŝtato por

Scienco kaj Teknologio persone bonvenigis nin. En iu akcepta bankedo, la urbestro de Quebec diris, ke tio estas honoro por la urbo Quebec, ke ili havas ŝancon akcepti la unuan delegacion de la ĉinaj sciencistoj. En ĉiu loko vizitita de ni, ni vidis la profundan amikecon inter la popoloj kaj sciencistoj de Ĉinio kaj Kanado.

Fine, la delegacio vizitis Usonon. Tie nin varme akceptis Profesoro E. L. Smith, prezidanto de la Komitato pri Erudicia Komunikado kun la Ĉina Popola Respubliko, Profesoro M. L. Goldberger, prezidanto de la Federacio de Usonaj Sciencistoj kaj Doktoro J. Stone, direktoro de la Federacio de Usonaj Sciencistoj. Ilia amikeco donis al ni profundan impreson. Estis postneĝega tago kiam ni veturis por viziti la Nacian Akcelilan Laboratorion kune administratan de 52 universitatoj. Norman Ramsey, prezidanto de la Universitata Studa Asocio kaj maljuna profesoro de Harvard-universitato, speciale venis de malproksime malgraŭ frosteco kaj malfacilo sur la aŭtovojo por akompani nin. Tian gastamon ni ricevis ĉie kien ni iris en Usono.

Ĉiuj tiuj kortuŝaj scenoj dronigis nin en amikecan maron. Tio vivece spegulis la profundan amikecon de la popoloj kaj sciencistoj de tiuj landoj al la ĉina popolo.

INTIMA RENKONTIĜO DE MALNOVAJ AMIKOJ

En mia juneco mi lernis en la brita Universitato de Kembriĝo kaj poste mi faris esploradon kaj instruan laboron en Usono, tial en tiuj landoj kaj Kanado troviĝas miaj malnovaj amikoj. Ĉifoje mi renkontiĝis kun iuj el la malnovaj amikoj kaj sentis pli da intimeco.

Miaj du antaŭaj instruistoj en la Universitato de Kembriĝo jam emeritiĝis. Informiĝinte ke mi venis al Britio, ili speciale venis al mi. La maljunaj profesoroj estis tre emociitaj kiam ili vidis min. Kaj ni sate interparolis pri la ŝanĝoj de la monda situacio dum la lastaj 30 jaroj kaj la amikeco inter la ambaŭlandaj popoloj. R. B. Pease, estro de Calham-laboratorio en Oksfordo, estas mia malnova amiko. Nia reintervidiĝo estis ekstreme intima kiam nia delegacio vizitis la laboratorion. En sia bonveniga parolado en la nomo de la tuta laboratorio, li deziris novajn sukcesojn en scienca

kampo al la ĉinaj sciencistoj per la vorto de Prezidanto Maŭ “Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon por la homaro”, kaj donis al ni speciale faritan donacaĵon. La bonveniga kunveno iris en sufiĉe varma atmosfero.

W. V. Lewis, vicprezidanto de la Kanada Komitato de Atomnuklea Energio, estis mia kunlernanto de la brita Universitato de Kembriĝo, kaj ni kune faris esploran laboron. Por intervidiĝo kun mi, lia malnova kunlernanto nevidita dum pli ol 30 jaroj, li veturis pli ol duhore per aŭto mem ĝin stirante al Otavo por partopreni la akcepton okazigitan de la ĉina ambasadorejo en Kanado por la delegacio. Ni varme interparolis pri la okazintaĵoj dum la pasintaj pli ol 30 jaroj kaj la disvolviĝo de la monda scienco kaj teknologio. Por esprimi la profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Kanado, li donacis al mi siajn publikigitajn sciencajn disertaĵojn kaj raportojn kiel memoraĵojn. Je la disiĝo, li forlasis min kun bedaŭro kaj diris memfide: “Ne necesos atendi pli ol 30 jarojn ĝis nia venonta intervidiĝo.”

Rektoro de Princeton-universitato en Usono interparolas kun la Delegacio de Ĉinaj Sciencistoj. Bej Ŝiĝang (la dua de maldekstre), estro de la delegacio, la rektoro (la tria de maldekstre), Baj Giefu (la kvara de maldekstre), vicestro de la delegacio, kaj Profesoro Ĝang Venju (la dua de dekstre).



Lee Grodzins, profesoro de la fizika fakultato de Massachusetts-a Instituto de Teknologio, estis aspiranto antaŭ pli ol 20 jaroj kiam mi estis lia instruisto en Purdue-universitato. Informiĝinte ke mi vizitos Usonon, li skribis al mi varmoplenajn leterojn unu post alia, dirante: “De multaj jaroj mi sopiras havi ŝancon vidi vin...” En la 2-a de decembro, li rapidis al la aerodromo de Bostono por min bonvenigi je matena krepuskiĝo. Kiam mi descendis de la aeroplano, li tuj rekonis min, kvankam miaj haroj jam blankiĝis. Grodzins forte premis mian manon kaj diris ĝoje: “Kiel emocia renkontiĝo!” Posttagmeze de la tago, li kune kun siaj edzino kaj du infanoj vizitis min kaj en la sekvinta tago lia tuta familio akompanis min ekskursi en antaŭurbo. Je la adiaŭo, Profesoro Grodzins deziris kun aparta emocio, ke la popoloj de Ĉinio kaj Usono amikiĝu de generacio al generacio.

Tre multaj estis tiaj kortuŝaj scenoj de reintervidiĝo de malnovaj amikoj dum la vizitado de la Delegacio de Ĉinaj Sciencistoj. Precipe intimaj estas tiuj sciencistoj-amikoj kiuj iam vizitis Ĉinion kaj starigis amikecon kun la ĉinaj kolegoj. Krome, multaj sciencistoj-amikoj skribis al ni varmajn leterojn pro tio ke mankis al ni tempo por intervidiĝi kun ili, kaj ili esperis ke ni vizitos ilin en la venonteco.

PLI DA KOMUNIKADO EN LA VENONTECO

Niaj malnovaj kaj novaj amikoj en la vizititaj landoj ĉiuj havis komunan deziron, ke pli da komunikado okazu venonte por pluapaŝe kreskigi la amikecon inter niaj popoloj kaj sciencistoj.

Antaŭ nia alveno al Usono, multaj usonaj universitatoj kaj sciencaj institutoj skribis leteron aŭ telefonis al la akcepta unuo por inviti la ĉinajn gastojn al ili. Ĉie en Usono kie ni venis, multaj nekonataj usonaj amikoj salutis kaj interparolis kun

ni. Ili diris: “Delonge ni jam sopiras ke vi alvenu!” “Bonvenigi gastojn el la nova Ĉinio estas nia dumlonga deziro!” Kiam ni vizitis Massachusetts-an Instituton de Teknologio, la pli-ol-70-jara edzino de la antaŭa rektoro speciale venis vidi nin kaj diris: “Vian viziton ni sopiris jam delonge!”

En la Universitato de Ĉikago, fame konata maljuna sciencisto sciigis al ni kun emocio, ke antaŭ pli ol 10 jaroj, lia filino volis havigi al si kelkajn poŝmarkojn de la nova Ĉinio, tamen tio estis tiam rigardata kiel “kontraŭleĝa” en Usono. Tial, li devis tion fari por sia filino en Britio, dum sia vizito al ĝi. Nun, kiam la ĉinaj sciencistoj venis al Usono, li tre ĝojis kaj diris: “Ni volas ke pli da amikoj vizitu nin kaj pli da komunikado okazu inter ni.”

Laŭ la difnita plano, ni povis viziti la Universitaton de Miĉigano, tamen tio nuliĝis pro malbona vetero. Profesoro Charles Overberger, kemiisto de alta polimero de tiu universitato, per longdistanca telefono salutis nian delegacion kaj deziris sukceson al nia vizitado. Li varme esperis ke pli da ĉinaj sciencistoj vizitos Usonon kaj precipe gastos ĉe la Universitato de Miĉigano.

En ĉifoja vizitado, ni faris esploradon kaj studadon pri iuj sciencaj temoj kune kun la britaj, svedaj, kanadaj kaj usonaj kolegoj kaj lernis multon de ili. Ili ankaŭ varme laŭdis la sukcesojn akiritajn de Ĉinio en scienca esplorado. Nia vizito ne nur pli fortigis la amikecon inter ni, sed ankaŭ akcelis la interŝanĝon en scienco kaj tekniko. Krome, nia delegacio interŝanĝis opiniojn kun la koncernaj gvidantoj de tiuj landoj pri pluapaŝa fortigo de amika komunikado kaj interŝanĝo kaj kunlaboro en scienco kaj tekniko inter sciencistoj. Mi profunde kredas, ke la ĉiam pli kreskanta amikeco inter la popoloj kaj sciencistoj de diversaj landoj certe donos riĉan rikolton.

**Vicestro de la Instituto de Atomnuklea Energio de la Ĉina Akademio de Sciencoj*



“Kanadaj Onklinoj Savis Min”

KREPUSKO jam vualis la angulan turon sur la murego de la Malnova Palaco. Malmultiĝis tie vojirantoj: regis kvieteco.

Subite leviĝis krioj sur la antaŭmura rivero. Du fremdlandaj virinoj klopodis eltiri ĉinan knabon falintan en akvon pro rompiĝo de glacio. Tamen, ili ne sukcesis en tio kaj eĉ mem falis en la frostan akvon. Nun aro da ĉinaj viroj sin ĵetis en la glacian truon por savi la falintojn.

Tio okazis iom post la 17-a horo de la 7-a de januaro. Aro da geknaboj sin amuzis sur la glaciĝinta rivero. Ili gaje glitis unu pelante alian per memfaritaj glitiloj kaj de tempo al tempo eligante ridojn kaj bruojn. Ĝuste en tiu tempo, Vej Mingdong, la 11-jara filo de Vej Guokiang, oficisto de la Muzeo de Malnova Palaco, falis en la akvon kaŭze de kreviĝo de la glacio.

Je pli ol 40 metroj de tie du fremdlandaj fraŭlinoj kune faris glitadon, ili estas tria sekretario fraŭlino Margaret Helen Cornish kaj ataŝeo fraŭlino E. A. Dale-Harris de la ambasadorejo de Kanado en Ĉinio. Vidinte la akcidenton, f-ino Cornish fluge alrapidis. La falinta knabo estis baraktanta malfacile en la akvo: kriza momento. Malgraŭ videbla danĝero, starante sur la rando de la breĉita glacio, Cornish klopodis eltiri la knabon sur la glacian. Unu, du, tri fojojn... antaŭ ol ŝi sukcesis eltiri la knabon, rompiĝis ankaŭ la glacio sub ŝiaj piedoj, kaj falis f-ino Cornish mem en la aperturon.

Pro la nesufiĉa dikeco de la glacitavolo, ankaŭ la postveninta f-ino Dale-Harris falis en la akvon.

La rivero profundas je ĉ. du metroj, kaj la akvo estis medolmorde malvarma. Sed la du kanadanoj daŭre klopodis levi la knabon supren.



La savita infano Vej Mindong kaj lia plijuna fratino Vej Gingvan kune rigardas bildlibron.

“Savu la knabon!”

“Helpu al la fremdlandaj amikinoj en akvo!”

Aŭdinte la kriojn, preterpasantoj tuj kuris tien.

En palpebrumo iu junulo nomata Gaŭ Julu sin ĵetis en la akvon, post li sekvis pluraj aliaj — laboristoj, kadroj kaj studentoj — transgrimpante la malaltan mureton sur la masonita bordo de la rivero. “Rapide savu la fremdlandajn amikinojn!” Oni kriis kun maltrankvilo kaj alportis ŝnurojn, stangojn kaj ŝtupetaron. Dank’ al la helpado de la amasoj, ĉiuj tri estis elakvigitaj.

Tiam f-ino Cornish svenis pro elĉerpiĝo de forto kaj frosto. Ŝoforo Haŭ Kide de preterveturanta aŭtomobilo tuj veturigis ŝin al la Pekina Amikeca Hospitalo. La kuracistoj de la hospitalo tuj faris al ŝi urĝan kuracadon. Rekonsciiĝinte f-ino Cornish zorgeme demandis al la apudstarantoj: “Kiel fartas la knabo? Ĉu li estas sekura?” Oni sciigis al ŝi ke nenio malbona estis al la knabo, nek al ŝia kolemino f-ino Dale-Harris, kaj esprimis al ŝi dankon pro ŝia sindonemo por savi la ĉinan knabon kaj laŭdis ke tio plifortigas la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Kanado. Kun rideto ŝi diris, skuante sian kapon: “Ne, ne mi savis la ĉinan knabon, sed la ĉinaj amikoj nin savis.”

En la sama tempo, kiam oni portis f-inon Cornish al la hospitalo, f-inon Dale-Harris estis kondukita al la hejmo de Li Liandi, la edzino de laboristo kiu loĝas apud la akcidentejo. Li Liandi kaj ŝiaj najbaroj deŝanĝis al ŝi la malsekigitajn vestojn kaj kuŝigis ŝin sur liton, volvinte ŝin en vatitan litkovraĵon. Ili zorgeme purigis kaj seninfektigis la vundojn sur ŝi. Kiam ili deziris esprimi al ŝi sian korsenton kaj admiron pro ŝia nobla ago, ili povis nur trovi rimedon el gestado pro la lingva baro. Post la forpaso de frostosento de Dale-Harris, oni sendis ŝin al la Ĉefurba Hospitalo, kie ŝi ricevis zorgeman ekzamenon kaj kuracon. Aŭdinte tiun novaĵon multaj ĉinoj venis al la hospi-

taloj por informiĝi pri ilia sanstato kaj esprimi sian korsenton. Ankaŭ respondeculo de la Ministerio de Eksteraj Aferoj venis al la hospitaloj por ilin konsoli kaj danki. La gepatroj de la knabo estis aparte kortuŝitaj, informiĝinte pri la okazaĵo, kiam ili hejmen revenis post sia laboro. Kiam ili rapidis al la hospitaloj, estis jam malfrue kaj la hospitaloj konsilis ilin reveni en la sekvanta tago, por ne ĝeni la ripozon de la kanadaj amikinoj.

Je la sekvanta tago, la gepatroj de la knabo kaj respondeculoj de la Muzeo de Malnova Palaco refoje venis al la hospitaloj, sed la kanadaj amikinoj jam forlasis ilin. La gepatroj tre bedaŭris ke ili povis nur sendi leteron por danki al ili. La letero diris: “Via brava ago montris vian amikecon al la ĉina popolo plifortigante la solidarecon inter niaj du popoloj. Kun intima saluto nia tuta familio esprimas al vi elkoran dankon.”

Ankaŭ la savita knabo nun jam resaniĝis. Parolante pri sia aventuro li diris al siaj amiketoj: “Kanadaj onkloj savis min, kaj mi nepre strebos al bonfaro kaj lernos de D-ro Bethune. Kiam mi plenkreskos, mi kontribuos en plifortigo de la amikeco inter la popoloj de Kanado kaj Ĉinio.”

La semo de amikeco trovis fekundan grundon en la knaba koro. Ni atendas ke ĝi kreskos por ĉiam vivplene.





PERUO KAPTIS 5 USONAJN FIŜŜIPOJN ENTRUDIĜINTAJN EN ĜIAN TERITORIAN MARON

Kvin usonaj fiŝŝipoj, kiuj kontraŭleĝe entrudiĝis en la teritorian maron de Peruo en la 17-a de januaro por fiŝkaptado je 50 marmejloj for de la perua marbordo estis arestitaj en kuna agado de la peruaj mar- kaj aer-trupoj.

Peruo difinis la limon de sia teritoria maro je 200 marmejloj.

La kaptitaj ŝipoj estis "White Star", "Blue Pacific", "Bold Venture", "Day Island" kaj "A. K. Strom".

EKVADORO ARESTIS UNU USONAN FIŜŜIPON EN SIA TERITORIA MARO

La 19-an de januaro, la ekvadora mararmeo arestis unu usonan fiŝŝipon, kiu entrudiĝis en la teritorian maron de Ekvadoro kaj kontraŭleĝe kaptis fiŝojn.

La Ĝenerala Stabejo de la Ekvadora Mararmeo anoncis, ke la usona fiŝŝipo "City of Panama" estis kaptita de la ekvadora patrolo en la teritoria maro apud Galapagos de Ekvadoro. Tio estis la dua fojo, ke tiu usona fiŝŝipo estis kaptita.


LA ARGENTINA REGISTRARO PUBLIKIGIS NOVAN LEĜON PRI FIŜADO

Por defendi sian fiŝ-provizon la argentina registaro publikigis novan leĝon pri fiŝado en la 6-a de februaro, laŭ kiu fremdlandaj ŝipoj estas malpermesitaj, de la 7-a de februaro, kapti fiŝojn en la argentinaj teritoriaj akvoj de 200 marmejloj.

La leĝo deklaris, ke ĉiuj vivaj riĉfontoj en la maro sub la argentina suverena aŭtoritato estas ŝtataj posedaĵoj kaj povas esti ekspluatataj nur de ŝipoj kun la argentina nacia flago antaŭe permesitaj de ĉi-rilataj aŭtoritatoj. Fremdlandaj ŝipoj, kiuj rompas la leĝon, estos punataj per monsumo de 5,000 ĝis 100,000 usonaj dolaroj.

Antaŭ la validiĝo de la leĝo, la argentina registaro jam aplikis certan limigan rimedon, laŭ kiu nur malgranda nombro da fremdlandaj ŝipoj kun la permeso de la argentina registaro povas kapti limigitan nombron da fiŝoj en la zono ses marmejlojn for de la marbordo en ĝiaj teritoriaj akvoj de 200 marmejloj.

En la plej granda ĉilia fabriko de kupraj produktaĵoj, laboristoj ekzamenas la kvaliton de produktaĵoj.



Aktivadoj de Kamparaj Belartaj Amatoroj

EN la kamparo de Huhian-gubernio de Ŝenhi-provinco ĉie troviĝas freskoj, propagandaj pentraĵoj kaj karikaturaj. Tiuj bildoj pentritaj de la kamparaj belartaj amatoroj rikoltis varmajn laŭdojn de la komunumanoj.

Tiu trupo de belartaj amatoroj, kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kiel sia kerno, sin formis en 1958, la jaro de antaŭensaltego de nia nacia ekonomio. En la lastaj 14 jaroj, sub la gvido de la Partio ĝi rapide kreskis hardiĝante en sia praktiko sub helpo de profesiaj belartaj laborantoj. Nun ĝi jam nombras ĉ. 500 personojn, inter kiuj troviĝas ne nur gejunuloj kaj virinoj, sed ankaŭ maljunuloj, ne nur komunumanoj sed ankaŭ kadroj de produktaj brigadoj kaj grupoj. Unuflanke ili partoprenas en produkta laboro, aliflanke ili sin okupas pri pentrado kaj per tio servas al la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj la plenumo de la ĉefaj taskoj de la Partio en diversaj periodoj. Aplikante diversajn formojn kiel ekzemple, propagandan pentraĵon, rakontan bildserion, lignogravuraĵon, papertranĉaĵon, olepentraĵon, karikaturojn kaj bildon de magia lanterno, ili faras propagandon sur stratoj, sur muroj kaj nigraj tabuloj, en ekspozicioj kaj aliaj lokoj laŭbezone kaj laŭeble.

En la lastaj dek jaroj, la tieaj kamparaj belartaj amatoroj kreis grandan kvanton da belartaĵoj, el kiuj pli ol 400 estis publikigitaj en lokaj aŭ tutlandaj gazetoj kaj ĵurnaloj.

Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**nepre ne forgesu la klasbatalon**”, la belartaj amatoroj kreis multajn verkojn pri la vivo de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj antaŭ kaj post la Liberiĝo kaj pri la kruela ekspluatado de bienuloj. Kaj pri tio ili verkis ankaŭ rakontajn bildseriojn, kiujn ili ekspoziciis en 156 produktaj brigadoj de la tuta gubernio, donante efikan klasbatalan edukon al la vizitantoj. Liu Hjuhju,

membro de Liu Laŭjan-brigado de Ĉengguan-komunumo verkis rakontan bildserion “La Malamo de Jardungito” laŭ la antaŭ-liberiĝa suferplena vivo de iu malriĉkamarano. Kiam ĝi estis montrita en ekspozicio, multaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj venis tien kun siaj gefiloj por ĝin rigardi. Ili diris, ke la bildoj estas bona materialo por klasa eduko. En ekspozicio aranĝita de kamparaj belartaj amatoroj, maljuna

Lu Ĝide (la dua de maldekstre), sekretario de la partia filio de Kinsan-brigado, longtempe persistas en amatora belarta aktivado kaj ofte petas de maljunaj kamaranoj opiniojn pri siaj pentraĵoj.





Kamparaj belartaj amatoroj pentras freskon pri la amasa movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo".

malriĉkamparano de Ĝaŭvang-vilaĝo de Laŭdian-komunumo diris kun larmoj en la okuloj al junuloj, starante antaŭ bildoj: "Infanoj, neniam forgesu la klasan malamon!"

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la belartaj amatoroj sin ĵetis kun siaj belartaj verkoj kiel armiloj, en la revolucion amasan kritikon al la reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki kaj similaj. Sole la karikaturoj verkita de ili jam nombriĝas ĉ. 1000. Kiam la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio estis venke malfermita, ili tuj sciigis tiun ĝojigan informon al la popolamasoj de la tuta gubernio per propagandaj bildoj, lignogravuraĵoj ktp.

Iliaj verkoj ankaŭ bone servis al la produkta batalo. Por akceli la disvolviĝon de la movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo" en la gubernio, la belartaj amatoroj propangandis la avangardajn farojn de Huaĝong-brigado de Kingguang-komunumo, la modelo de la tuta gubernio, per rakonta bildserio kun tre bona efiko. Sur konstruejoj de

akvoutiligaj projektoj kaj ŝoseoj, ĉie oni povis vidi iliajn pentraĵojn kiuj spegulas la vivon kaj laboron de la konstruantoj, kaj ricevis edukon kaj kuraĝigon de ili.

"Sen revolucia batala vivo, ne povas esti bona belartaĵo." Tio estas komprenaĵo akirita de Liu Ĝiguj. Dum sia kuna vivado kaj laborado kun popolamasoj, li kreis multajn verkojn, el kiuj pli ol dek jam aperis en lokaj aŭ tutlandaj gazetoj aŭ ĵurnaloj. Liaj verkoj "Plia Okupateco je Riĉa Rikoltado" kaj "Grava Rolo de Virinoj" fidele spegulas la laboran vivon de komunumanoj kaj ilian noblan spiriton. La du verkoj estis montritaj en la Tutlanda Belarta Ekspozicio okazigita en Pekino en la jaro 1972.

En sia praktika verkado, la belartaj amatoroj tre alte taksas la rolon de kolektivo kaj la saĝon de la amasoj. Ili kolektas opiniojn de la amasoj pri iliaj verkoj kaj ripetfoje ilin plibonigas por ke la verkoj pli kaj pli perfektigu kaj pro tio ili ricevis sincerajn laŭdojn de la popolanoj.



LA mongola nacio de Ĉinio estas brava kaj diligenta nacio kun longa historio. Ĝi havas pli ol 1,600,000 membrojn. Plejparto el ili loĝas koncentre en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la resta parto en la provincoj kaj aŭtonomaj regionoj Liaŭning, Gilin, Hejlonggiang, Gansu, Kinghaj, Ninghia kaj Hingiang. Krome, malgranda nombro da mongoloj koncentre aŭ dise loĝas ankaŭ en aliaj lokoj de nia lando.

I

En la regiono, kie koncentre loĝas la mongoloj, sin trovas vastaj stepoj. La Mongola Altebenejo en la norda parto de Interna Mongolio kaj la Ordos-altebenejo en ĝia suda parto estas fame konataj paŝtejoj en Ĉinio. La ĉevaloj de Sanhe ĝuas famon en kaj ekster nia lando kaj estas uzataj

por rajdado kaj tirado de veturilo. La bovoj de Uĝumĉin apartenas al unu el la bonaj specioj en nia lando. Subtere de tiu ĉi regiono abundas mineraloj. Ekzemple konstruiĝis karbominejoj en Ĝuozi-monto, Oda kaj Baŭtoŭ kaj ferminejoj ĉe Bajan Obo. En centoj da grandaj kaj malgrandaj lagoj abundas salo kaj alkalo. La amplekso de forstoj en la Granda Hing-an-montaro okupas sesonon de tiu de la tuta lando. En tiu maro de arboj vivas tigroj, ursoj, cervoj, zibeloj, linkoj, cignoj kaj aliaj raraj bestoj kaj birdoj kaj produktiĝas tiaj altvaloraj drogoj kiaj juna korno kaj placento de cervo, ursa galveziko, mosko, ktp. Tie fluas pli ol 80 grandaj kaj malgrandaj riveroj. La Riverkurbiĝa Ebenejo, kie trapasas la Flava Rivero, havas fekundan teron kaj bonan irigacian sistemon. Deantikve oni diris, ke "la Flava Rivero portas al la loĝantoj centojn da malutiloj, sed utilon

Trinkigo de ĉevaloj

de Hing Lian



nur al la Riverkurbiĝa Ebenejo", tial oni nomas ĝin surstepa grenejo. Inter la ĉefaj kulturitaĵoj estas tritiko, aveno, milio, terpomo, olelino kaj beto.

II

La mongola nacio estis iom post iom formita el multaj nordaj triboj de nia lando dum sia longdaŭra historia disvolviĝo. En Tang-dinastio (618-907 p.K.) jam aperis notoj pri la mongola tribo. En la jaro 1279 p. K. la regantoj de la mongola nacio entrudiĝis en la internan parton de Ĉinio, fondis Juan-dinastion, kaj regis la tutan Ĉinion. Post renversiĝo de Juan-dinastio, la feŭdaj ĉefoj interne de la mongola nacio kondukis inter si longdaŭran militon, kio metis la mongolan socion en longtempan feŭdan displitiĝon. En la relative longa periodo antaŭ la Liberiĝo, la agreso de imperismo, subpremado fare de la kuomintanga reakciularo kaj kruela feŭda ekspluato kaŭzis stagnadon al la mongola socio, multe postigis ĝiajn ekonomion kaj kulturon kaj abrupte reduktis la nombron de la mongoloj.

En la pasinteco, la mongoloj ĉefe okupiĝis pri paŝtado, kaj tial ili akiris la nomon de "nomada nacio". En la lasta jarcento plejparto el ili iom post iom transiris al agrikultura produktado, sed brutobredo ankoraŭ okupis gravan lokon en ilia ekonomio. La regiono de Interna Mongolio estas unu el la paŝtaj bazlokoj de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo kiam regis duon-feŭda kaj duon-kolonia socio, en la paŝta areo ankoraŭ ekzistis restaĵoj de servuta sistemo, dum en la agrikultura areo ĉefe kondukiĝis bienula ekonomio. Tiam la absoluta plejparto de la brutaro de la interna-mongolia paŝta areo, kiu estis ĉefa produkta rimedo tie, estis posedajo de la feŭdaj ekspluatantoj. La nobeloj, brutoposedantoj kaj riĉpaŝtistoj okupis nur 7-8% de la tuta loĝantaro, sed ili posedis 75% de la tuta brutaro. La malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj okupis 75% de la loĝantaro, sed posedis nur 7-8% de la brutaro. La nobeloj kaj feŭdaj brutoposedantoj ankaŭ ĝuis multajn privilegiojn: heredon de nobela titolo, posedon de sklavoj, rekviziciadon de senpagaj laborfortoj ktp. Tamen la laboranta popolo havis nek politikan rajton, nek garantian por sia persona libereco kaj vivis tre mizere.

La mongola nacio havas sian propran lingvon. Ekde la komenco de la 13-a jarcento p. K. jam ekzistis la mongola lingvo, poste ĝi estis reformita kaj fariĝis la hodiaŭa mongola lingvo. La mon-



Mongolaj paŝtistoj aĉetas varojn kun nacia karakterizaĵo.

gola nacio havas eminentan kulturen tradicion. *La Sekreta Historio de Mongolio* verkita en la meza periodo de la 13-a jarcento p. K. estis la unua fama verko el la historiaj literaturaĵoj de tiu nacio. Romanoj, noveloj, infankantoj, enigmoj kaj popolkantoj konsistigas ĝian tradician literaturon. Ankaŭ la kantorakonta formo "Haŭlajbaŭ" estas tre populara. La ĉevalkapa arĉa kordmuzikilo estas plej ŝatata de la mongoloj, kies tembro estas milda kaj bela kun sonoraj kaj barelecaj tonoj, kaj taŭgas por ludo sur vasta stepo. Sed en la malnova socio, la kulturo kaj arto de la mongola nacio suferis de detruado kaj tute ne povis disvolviĝi.

III


La vivo kaj kutimo de la mongoloj estas ĝenerale karakterizitaj per la trajtoj de nomada nacio. En la pasinteco, la mongolaj paŝtistoj plejparte loĝis en jurtoj. Post la Liberiĝo ili iom post iom transloĝiĝis en brikajn domojn kaj dume ili daŭre paŝtas sur malsamaj stepoj laŭ malsamaj sezonoj. Iliaj manĝaĵoj estas ŝafaĵo, laktaĵoj kaj bakita milio. Ilia ĉefa trinkaĵo estas preparita per brika teo. En la agrikultura areo, ili plejparte loĝas en domoj konstruitaj laŭ la stilo de han-nacio kaj prenas grenon kiel ĉefan manĝaĵon. La mongolaj viroj kaj virinoj ĉiuj ŝatas sin vesti per roboj, zonoj kaj botoj. Iliaj vestoj estas faritaj el diverskoloraj silkaĵoj. La mongoloj estas bravaj rajdantoj, kaj en la aĝo de 6 aŭ 7 jaroj jam povas rajdi sur ĉevalo. "En la lokoj abundaj je akvo kaj herbo paŝtiĝas

gregoj de bovoj kaj ŝafoj, kaj en la domoj de bonkuroloj kolektiĝas multaj gastoj”, tiu proverbo montras la gastamon de la mongoloj. La mongoloj ankaŭ estas lertaj en kantado kaj dancado, kaj ĉiu viro aŭ virino povas komponi kaj kanti. Lukto estas ilia ŝatata sporto. Nadmu-foiro estas tradicia festa kunveno okazigita ĝenerale en ĉiu jaro, en kiu oni prezentas luktadon, rajd-konkurson, sagpafadon kaj aliajn amuzojn, faras interŝanĝon de varoj kaj okupiĝas pri propaganda aktivado. La mongoloj komence kredis religion Saman sed de post Juan-dinastio komencis kredi lamaismen venintan el Tibeto. Post la Liberiĝo, la Partio kaj la registaro efektiviĝas politikon de libereco en religia kredo.

IV

La mongola popolo havas gloran tradicion de revolucia batalo. En la mizeraj jaroj antaŭ la Liberiĝo, ĝi faris persistan batalon kontraŭ imperismo kaj feŭdismo. En 1858, ĝi faris en Ikĝaŭligo (= subregiono) longdaŭran batalon kontraŭ la regado kaj subpremado de King-dinastio kaj mongolaj nobeloj. Post kiam movado de Jihe-tuan eksplodis, la interna-mongolia regiono tuj fariĝis unu el la ĉefaj aktivaj regionoj de tiu movado. Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, la revolucia batalo de la mongola popolo sub la gvido de la Partio paŝis en novan etapon. Dum la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito, en la mongola popolo fondiĝis organizoj de la Partio kaj revoluciaj armitaj fortoj kaj disvolviĝis arda revolucia movado kaj armita batalo.

Laborantoj de Hilinguole-bestkuracejo lavas gregojn per likva medikamento por preventi malsanon.



En la Kontraŭjapana Rezistmilito, la mongola, hana kaj alinaciaj popoloj sub la gvido de la Partio starigis Dakingŝan-bazon kontraŭ la japana imperiismo en la regiono de Interna Mongolio kaj persiste batalis ĝis la fina venko. En la Liberiga Milito ankaŭ la mongola popolo faris sian kontribuon same kiel alinaciaj popolanoj.

V

Post la Liberiĝo, la mongola popolo sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ trapasis grandan socian ŝanĝon.

Tiel frue kiel en 1947 naskiĝis la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio plej frue starigita en nia lando, starigis unu post alia 3 aŭtonomaj subprovincoj kaj 7 aŭtonomaj gubernioj. En la lokoj kie efektiviĝis nacia aŭtonomio estis redikale abolita la sistemo de nacia subpremo. En la demokratia kaj socialisma reformoj, la Partio kaj la ŝtato aplikis, laŭ la komplikaj klasaj kaj naciaj rilatoj en naci-malplimultaj lokoj, pozitivan kaj diskretan orientilon kaj praktikas politikojn konforme al la realeco en la mongol-nacia regiono, nuligis feŭdan privilegion, laŭpaŝe abolis la ekspluatatan sistemon de bienuloj, brutoposedantoj, kulakoj kaj riĉpaŝtistoj. Poste, pere de interhelpaj grupoj, kooperativigo kaj komunumigo, la vastaj kamparanaro kaj paŝtistaro suriris la socialisman kolektivigan vojon. En la konstruado de la ŝtataj organoj, la Partio tre atentis pri la kulturado de naciaj kadroj, kaj granda nombro da mongolaj kadroj enoficiĝis kiel gvidantoj en diversnivela

Sanitaristino sur stepo



partiaj kaj registaraj organoj.


La Partio kaj la ŝtato donis grandan subtenon al la mongolnacia regiono por radikale ŝanĝi ĝian ekonomian kaj kulturen postrestintecon hereditan de historio. Ekz., la totala investo de la ŝtato por la fundamenta konstruado de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio post la Liberiĝo atingis pli ol sep miliardojn da juanoj. En la pasinteco, la industria bazo de tiu ĉi regiono estis tre malforta kaj ĝi apenaŭ posedis modernan industrion. Nun, en la tuta regiono stariĝis pli ol 2,000 industriaj kaj minaj entreprenoj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj, kies totala produktovaloro kreskis 101-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Samtempe kun tio, la Partio kaj la ŝtato ankaŭ difinis serion da orientiloj kaj politikoj por disvolvi ĝiajn agrikulturon kaj brutobredadon. En la paŝtaj areoj oni iom post iom efektivigis fiksan loĝadon flanke de migra paŝtado, reformis akvomankajn paŝtejojn kaj dezertojn, plifortigis stepan konstruadon, plibonigis speciojn de brutoj, racie uzis paŝtejojn kaj iom post iom mekanikigis brutobredadon, kaj ĉio ĉi tio multe akcelis la disvolviĝon de la paŝta laboro. Nun la totala nombro de brutoj en tiu ĉi regiono kreskis preskaŭ 3-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la agrikulturaj areoj la produktokvanto de greno konsiderinde kreskis dank' al la fundamenta kampara rekonstruado fare de la amaso kaj la senĉesa plialtigo de mekanikiga nivelo.

Antaŭ la Liberiĝo, preskaŭ ne ekzistis lernejoj en la vasta paŝta areo, kaj pli ol 90% de la paŝtis-

toj estis analfabetoj. Nun en tiu ĉi regiono jam ĝeneraliĝis la elementa eduko, stariĝis pli ol mil mezlernejoj kaj mezgradaj teknikaj lernejoj kaj 7 altaj lernejoj. La Partio kaj la registaro ĉiam atentis pri la apliko kaj disvolvo de la lingvoj de la nacimalplimulto. En tiu ĉi regiono, oni uzas mongolan kaj hanan lingvojn tiel en oficialaj dokumentoj kiel en disaŭdigo, eduko, eldonado, literaturo kaj arto kaj aliaj sferoj. La ŝtato instigas ne nur la hanojn lerni la mongolan lingvon sed ankaŭ la mongolojn lerni la hanan lingvon. Sub la direktado de la revolucia linio de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ, la kulturo kaj arto de la mongoloj ricevis sanan disvolviĝon. Tiu ĉi regiono havas pli ol 1,200 projekciajn unuojn. Ĉiu ligo kaj urbo starigis sian profesion artan trupon, kaj ĉiu hoŝo (= gubernio) kaj gubernio starigis sian nacian artan propagandan taĉmenton Ulanmuĉi. Tiuj propagandaj trupoj aktivadas en la vastaj paŝtaj kaj agrikulturaj areoj.

Ankaŭ la kuraca kaj higiena afero ricevis kompare grandan disvolviĝon. En la diversaj lokoj de tiu ĉi regiono ĝenerale stariĝis kuracaj kaj higienaj institucioj kaj la nombro de kuracaj laborantoj kreskis 18-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La veneraj malsanoj kaj pesto serioze malutilaj al sano de la loĝantoj estas tute forigitaj, ankaŭ la Brucella-malsano kaj aliaj lokaj malsanoj estas fundamente regataj. La ŝtato, en kiu kontakaj malsanoj furiozis kaj la nombro de loĝantaro reduktiĝis, estis jam ŝanĝita. En la pasintaj 20 jaroj la mongola loĝantaro de tiu ĉi regiono jam pli ol duobliĝis.

Ĉevalkapto





PRESARTO

PRESARTO estas unu el la gravaj antikvaj inventoj de Ĉinio.

Antaŭ la eltrovo de presarto, la libroj estis kopiitaj permane. Multe da tempo kaj energio oni devis uzi por kopii libron eĉ kun ne tre multaj vortoj, kaj krome ofte aperis eraroj en la kopiaĵo. Multaj verkoj malaperis nur pro tio, ke ne estis multaj kopioj de ili. La invento de presarto multe akcelis la disvolviĝon de la homa kulturo.

Kiel do oni eltrovis tiun arton?

ŜTONPLATOJ KUN GRAVURITAJ VORTOJ KAJ SIGELILOJ

La fakto ke elterigitaj fajencaĵoj de neolito de nia lando surhavas nigrajn desegnojn pruvas, ke nia lando komencis uzi nigran inkon en tre malproksima antikveco. En Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.), nia lando eltrovis ankaŭ paperon. Kaj inko kaj papero estis necesaj materiaj kondiĉoj por la eltrovo de presarto.

Nia lando frue trovis ne nur taŭgajn materialojn por presado, sed ankaŭ plurajn metodojn por reprodukti tekston kaj bildojn. Interalie, la uzo de gravuritaj ŝtonplatoj kaj sigeliloj havis rektan rilaton kun la invento de presarto.

Antaŭ 770 a. K., laŭ historiaj literaturoj, jam aperis ŝtongravuraĵoj. Kaj en Orienta Han-dinastio estiĝis ŝtonplatoj kun gravuritaj vortoj. Ĉar tiam oni rimarkis, ke en la kopiitaj libroj ofte aperis eraroj, kiuj malhelpis la legadon, tial oni gravuris tekstojn sur ŝtonplatoj kaj poste frappris ilin sur paperon. La gravuritaj vortoj estas kavaj. Por produkti kopion de la teksto, unue oni sternas malsekan paperon sur la ŝtonplaton kaj ĝin frapas per mola bulo, tiel ke ĝi enpremiĝas en la kavajn strekojn; poste oni ŝmiras nigran inkon sur la paperon, tiel ke la kavaj vortoj restas blankaj; fine oni deprenas la paperon, ĝin sekigas kaj tiam pretiĝas unu kopio.

Pli poste oni uzis lignajn tabulojn anstataŭ ŝtonplatojn en frappsado. Tiu metodo estis pli

ekonomia kaj oportuna. La apero de frappresa metodo malfermis vojon por eltrovo de presarto.

Ankaŭ la sigelilo, kiun oni komencis uzi antaŭ ĉ. 3,000 jaroj kaj nun ankoraŭ vaste uzas en Ĉinio, ludis sian rolon en eltrovo de presarto.

En Tang-dinastio (618-907 p. K.), fine oni eltrovis la plej fruan presarton en la mondo, presadon per gravurita lignotabulo.

PRESADO PER GRAVURITAJ LIGNOTABULOJ

Tang-dinastio estis periodo de granda disvolviĝo de produkto kaj prospero de kulturo en la historio de nia lando. Kun la disvolviĝo de ekonomio, kreskis ankaŭ la kultura bezono de la popolo. Tiam multiĝis la bezono de libroj.

Sigelilo povas klare presi nigrajn vortojn sur papero. Sed ĝi estas tro malgranda por presi multajn vortojn. La frappresa metodo, kiu produktas kopion de blankaj vortoj en nigra fono ne tiel okulfrapaj, estas komplika kaj maloportuna por presado en granda kvanto. Tamen la ŝtonplatoj estas multe pli vastaj kaj povas reprodukti grandan nombron da vortoj en unu fojo. Ĉu ne estas pli bone ke oni kombinu la avantaĝojn de sigelilo kaj frappresa ŝtonplato? Sekve oni gravuris elstarajn vortojn sur lignaj tabuloj en konvena grandeco kaj presis per ili tekston de libroj. Ekzistanta literaturo pruvas, ke tia presado per gravurita lignotabulo estas inventita en la frua periodo de Tang-dinastio. La plej frua presaĵo eltrovita en nia lando estas la *Diamanta Sutro* de Tang-dinastio presita en 868 p. K. Ĝi estas presita per 6 oblongaj lignotabuloj kaj alia gravurita bildpaĝo. Ĝiaj vortoj estas bele kaj lerte gravuritaj, kaj la presaĵo tre neta. Tamen domaĝe estas, ke tiu historia raraĵo estis forŝtelita de imperiisto.

En Song-dinastio (960-1279 p.K.), multe pli disvolviĝis tiu presarto. Tre multaj verkoj de Song-dinastio presitaj per tiu metodo estas trovitaj kaj konservitaj de nia popolo kiel altvaloraĵoj.

ARGILAJ KAJ LIGNAJ PRESIDEOGRAFAĴOJ

La kreo de gravurita presplato estas grava eltrovo. Sed presado per tiu metodo estas temporaba kaj por presi ampleksan libron per ĝi, oni bezonas eĉ plurajn jarojn. Kiamaniere ĝin plibonigi?

En la regperiodo Kingli (1041-1048 p.K.) de la imperiestro Ĵenzong de Song-dinastio, Bi Ŝeng eltrovis pli bonan presmetodon kun moveblaj presideografiaĵoj. Li faris argilajn pecojn, gravuris po ideografiaĵon sur ili kaj ilin bakis, tiel ke ili fariĝis malmolaj presideografiaĵoj. Por presi per ili, unue oni metis la necesajn presideografiaĵojn laŭorde en feran kadron sur ferplato, kiu surhavis rezinon kaj vakson, kaj poste varmigis la platon per fajro, ke la prespecoj kungluiĝu. Fine oni premis la argilajn pecojn per ebena tabulo, tiel ke ili kune formu taŭgan presplaton.


Por rapidigi la laboron, li havigis al si du ferajn platojn, ke presado kaj kunmetado de presideografiaĵoj povis iri samtempe. Kaj krome, li pretigis plurajn prespecojn por ĉiu ordinara ideografiaĵo

kaj dekojn por la ofte uzataj. Se li bezonis prespecon de malofte uzata ideografiaĵo, kiun li ne preparis antaŭe, li tuj gravuris ĝin. Post presado, la ferplaton li varmigis por fandi la rezinon kaj vakson sur ĝi kaj depreni la prespecojn por plua uzo.

La dirita metodo estis la plej frua presarto. Kvankam tiu metodo inventita de Bi Ŝeng estis relative primitiva, tamen ĝi jam havis la tri ĉefajn procedojn de tiu presarto, nome faradon de presideografiaĵoj, kompostadon kaj presadon. Li faris tre grandan kontribuon per tiu eltrovo.

En la dinastioj Juan kaj Ming (1271-1661 p. K.) oni faris presideografiaĵojn el ligno, stano, kupro kaj plumbo. En la dinastioj Ming kaj King (1368-1911 p. K.), lignaj presideografiaĵoj estis vaste uzataj. Dum la regado de imperiestro Kianlong de King-dinastio (1736-1795 p. K.), oni gravuris 253,500 presideografiaĵojn kaj presis per ili 138 verkojn kun entute 2,300 volumoj. Tio estis la plej grandskala presado per lignaj presideografiaĵoj.

Paĝo presita en Ming-dinastio per kupraj moveblaj presideografiaĵoj



Paĝo presita en Song-dinastio per presplato



Sur la Kovrilo:

Laboristoj ekzamenas la kvaliton de muzikiloj.

Sur la Dorskovrilo:

Juehiu-parko de Kantono

KOREKTO POR N-RO 3

Anstataŭ "tramisto" (p. 34, maldekstre L. 27) legu "pramisto" kaj anstataŭ "ke de ili por" (p. 41 dekstre L. 1) legu "de ili por ke".



EL POPOLA ĈINIO 人民中国新闻

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (177) 1973

Ĉefa Enhavo

La Malpeza Industrio de Ĉinio.....	1
Rejuniĝas Malnova Fabriko	6
Brakhorloĝo "Dongfeng"	9
Maŭtaj-brando	12
Daĝaj Marŝas Antaŭen	13
Nova Fiŝista Vilaĝo (<i>poemo</i>)	20
Kantono — Fama Urbo en Suĉa Ĉinio	21
Riĉa Rikolto de Kotonon	25
Vicprofesorino Vu Hiuĵong	29
Kuracejo sur Insulo	31
Amika Vizitado.	33
"Kanadaj Onkloj Savis Min"	37
Aktivadoj de Kamparaj Belartaj Amatoroj	40
Mongoloj	42
Presarto	46

Esplorado pri Neĝmontaro


Ĉiujare de oktobro ĝis aprilo de la sekvanta jaro, neĝoŝtormo en Tianŝan-montaro de Nordokcidenta Ĉinio furiozas kaj kovras la ŝoseojn, kio kaŭzas grandan malfacilaĵon al la socialisma konstruado de la regiono kaj la vivo de ĝiaj popolanoj.

Por elimini la malutilon alportitan de neĝoŝtormo, la Gansu-a Esplora Instituto de Glacirivero, Glaciĝinta Grundo kaj Dezerto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj koncernaj unuoj organizis laborgrupon por preventi kaj elimini neĝan plagon. En kunlaboro de ŝoseoprotektistoj, ĝi unuapaŝe konis la fundamentan leĝon de neĝoŝtormo en detruado de ŝoseoj post 4-jara esplorado, observado kaj inĝenieraj eksperimentoj sur ŝoseoj kovritaj de neĝo, kaj per tio faris kontribuon por ŝosea konstruado en neĝkovrita altebenejo.


Scienc-esploraj laborantoj kaj lokaj popolanoj kune esploras neĝblovadon.







Aŭtoj veturantaj sur ŝoseo serioze minacata de neĝoŝtormo de Tianŝan-montaro



Sciencaj laborantoj studas formigon de surŝosea neĝamaso por trovi preventan metodon.



Observado de moviĝo
de neĝ-monteto post
neĝoŝtormo

Oni esploras per apa-
ratoj detruadon kaŭ-
zitan de neĝoŝtormo
al la ŝoseo.





Sciencaj laborantoj faras esploradon en frosto de pli ol 30°C sub la nulo.




Ginko

Ginko estas grava ekonomia arbo. Ĝiaj fruktoj estas manĝeblaj kaj nutroriĉaj. Ili ankaŭ povas esti uzataj kiel drogo. La ginkofruktoj de la provincoj Giangsu, Ĝegiang kaj Anhuj de nia lando estas aparte famaj.

Tiu arbo estas tre antikva plantaĵo, tial oni nomas ĝin "viva fosilio". Hodiaŭ, ĝi preskaŭ malaperis en naturaj arbaroj, krom tre malmultaj sovaĝaj ginkoj en la orienta parto de nia lando.

Ĝia semo estas nuda, kaj ĝia ventumil-forma folio havas dikotomajn nervuron en la mezo. Tiuj karakterizaĵoj estas tre maloftaj ĉe aliaj pli evoluintaj gimnospermaj plantaĵoj.

La arbo kreskas malrapide kaj ĝia vivo estas longa, tial ĝi ricevis la nomon "praavo". Ĝenerale ĝi komencas fruktodoni post kresko de 15-20 jaroj kaj iras en fruktubundan periodon post ĉ.40 jaroj, kaj eĉ 300-400-jara maljuna arbo ankoraŭ povas frukti.





1423/1